



Tra la Mondo

Tutmonda ilustrata Revuo esperantista

TRA-LA-MONDO-ESPERANTO-SEMAS-SIAJN-BONAĴOJN.
 PLI-FACILIGAS-LA-KOMERCAJN-INTERKILATOJN-KONIGAS.
 LA-INDAJN-ELTROVOJN-KUNHELPOS-POR-ANSTATAVI.
 DE-FRUKTODONA-PACO-LA-SANGAJN-BATALADOJN.
 KIUJ-DISSTRAS-HOMARON.



Allegorio speciale verkita de Sinjoro Pillec, fama gravuristo de medaloj, sendita en la francan Roman lernejon post ricevo de V' granda premio.

Jara abono : 8 frankoj, ĉiulande. — Kvaronjara abono : 2.25 fr. — Unu kajero : 0 fr. 75 c.

ĜENERALA PLANO KAJ ENHAVO.

	Paĝo.
Nuntempaĵoj : Björnstjerne Björnson, de Nils Ökland (NORVEGUJO)	81 ^a
Sangaj elfluoj en Praha, de So. Bouška (BOHEMUJO)	82 ^a
Ĉieaj eĥoj : Politikaj rilatoj en HUNGARUJO, de So. A. de Marich; KATALUNUJO, de P. V	83 ^a
Sportoj : La Nov-Zelandaj « Futbol » istoj, de C. Snape (ANGLUJO).	84 ^a
Artista kaj literatura vivado : Mathias Jochumsson, el Th. Th. (ISLANDO); Leo Tolstoj, de A. Porfirjev (RUSUJO); La franca Pentrarto en Londono, de J. C. Rust ((ANGLUJO); Francisko Navarro Edesina, de Vincente Inglada (HISPANUJO).	85 ^a
Pri Esperanto : Kroniko, de Steleto	86 ^a
Miksa paĝo : Rondedanco de So. Deshays; diversaj sciigoj	87 ^a
Komerco kaj Industrio : La mondfamaj fabrikejoj de Creusot, de So. Bord (FRANCUJO)	88 ^a
Diversaj sciencoj : (Sociologio) La Belga reĝa Instituto de St.-Lambrechts-Woluwe, de Luis Carlos (BELGUJO)	90 ^a
Felietono : Judith, ilustrita novelo de F. Oxenford (ANGLUJO)	95 ^a
Miksaĵoj : Por la propagando, amuzaj, ludoj, k. t. p. de Ch. Brunet.	96 ^a

REPRESO DE ARTIKOLOJ KAJ ILUSTRAĴOJ.

Kelke da niaj kunfratoj esperantistaj kaj ne esperantistaj esprimis al ni la deziron represi niajn artikolojn. Ni volonte tion permesas por artikoloj sed ne por ilustraĵoj, kondiĉe ke oni ĉiam sciigu la devenon de tiuj artikoloj, aldonante la adreson de l' administracio kaj la plenajn prezajn kondiĉojn:

JARA ABONO: En ĉiuj landoj: 8 fr. — **KVARONJARA ABONO**: 2 fr. 25 c.

DUONJARA ABONO: 4 fr. 50 c. — **UNU NUMERO, AFRANKITA**, 0 fr. 75 centimoj.

Pageblaj per poŝtmandatoj — Nur de l' landoj ne havantaj internaciajn mandatojn, aŭ por pago de specimenoj, ni akceptos poŝtmarkojn, plenvalore.

REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO.

Sendi ĉiujn dokumentojn (*krom miksaĵoj*) al So. Montrosier, 8^{bis} Rue de l'Écu d'or, Orléans, (France). Miksaĵoj, t. e.: ludoj, amuzaj, problemoj kaj solvoj devas esti sendataj al So. Brunet, 59, Cours Victor Hugo, Bordeaux, (France). *Atentu pri la nova adreso de So. Montrosier.*

Sendi mendojn KUN MONO al:

Administranto de « Tra la Mondo », 15, Boulevard des Deux Gares, Meudon (S. et O), France.

ONI POVAS MENDI ĈE « TRA LA MONDO »

Ĉiujn librojn kaj gazetojn esperantajn. Mendoj estas ĉiam rapide plenumataj. Aparte oni povas aboni je « Gefratro esperantista » (4 fr. ĉiujare), « Germana esperantisto » (3 fr. 37) kaj « Espero Katolika » (2 fr.).

Ĉiuj mendoj devas esti akompanataj de l' mono necesa por pagi la abonon aŭ la volumojn, ne forgesinte fiksitan rajton da 10 centimoj por korespondado, kaj la koston de l' sendo NUR POR LA LIBROJ. Tiu kosto estas 0 fr. 10 ĝis valoro de 1 fr., kaj 10 % por pli kostaj volumoj.

Pro la pli kaj pli kreskanta nombro de ricevataj petoj pri sciigoj ni, estonte, respondos nur kaj nepre al petoj akompanataj de poŝtmarko por la respondo.

Ni petas personojn, kiuj ne havas tre gravan kaŭzon por alie agi, aboni kaj abonigi senpere ĉe nia administracio.

HODIAŬ DU LETERPORTISTOJ!

SED KIOM MALSIMILAJ !!

[Tiom la dua estas ŝargita (li portas manuskriptojn por la Revuo), tiom la unua ne estas tia. Kion do li havas en sia ligna paperujo! Ve! li alportas abonojn, kaj tute ne fleksiĝas sub la ŝargo!]

Amikoj abonintoj, laboru por pligrandigi la enhavon de la abonskatolo; kaj vi, malmultaj legantoj, iĝu abonintoj kaj propagandantoj. Ekpeno de ĉiu profitos al ĉiuj, ebligante eldonon ankoraŭ pli belan kaj pli ilustratan.

Niaj ses unuaj numeroj

Malgraŭ malfacilaĵoj ĉiuspecaj, ni sukcesis pleniĝi nian planon: doni al Esperantistaro revuon indan je ĝia nuna situacio.

Ne kostante pli ol iu ajn alia esperantista revuo malgraŭ la kosto de l' ilustraĵoj, « Tra la Mondo » enhavas ampleksan materialon por la legado kaj la okuloj, kaj ĉiuj artikoloj, nelegeblaj alie kaj speciale verkitaj por la revuo estas senesepte legendaj.

Sufiĉas relegi la enhavon de l' 6 unuaj numeroj por vidi la variecon de l' temoj traktitaj.

Neniu revuo esperantista, ĝis nun, eldoniĝis laŭ plano tiel moderna, viva kaj zorge pripensita; neniu revuo proponis al siaj legantoj enhavon tiel ŝatindan, en kiu la temoj estas ĉiam traktataj de kompetentuloj kaj anoj de l' landoj aludataj (*vidu ĉi supre*); neniu revuo estis tiel lukse eldonata; neniu, fine, oferis al sia legantaro premiojn tiel valorajn.

Oni do bonvolu helpi nian disvastigon kaj ebligi por ni plenumon de projekto kiu pligrandigos ankoraŭ la intereson de « Tra la Mondo ». Aparte ni petegas niajn abonintojn bonvoli montri la revuon al lokaj naciaj ĵurnaloj kaj peti enpreson de artikoletoj por « Tra la Mondo », kaj de ĝia ĉiumonata enhavo.

Neniu gazetisto vidante la kolekton de l' 6 jam aperintaj numeroj povos nei la taŭgecon de Esperanto por tutmonda informado kaj tiu elmonro povos tre favore atentigi pri nia lingvo personojn dubantajn ankoraŭ pri ĝia taŭgeco por ebligi traktadon de ĉiuj temoj.

Tre bona rimedo por trafi tiun celon estos, kiam oni povos, enpresigi tradukojn en naciajn lingvojn de niaj politikaj informoj.

LA ADMINISTRANTARO.



Kiel oni povis rimarki, ni nun akceptas poŝtmarkojn laŭ ilia plena valoro, por pago de specimenoj. Tiu rezultato estas ŝuldata al la afableco de So. Ĉefeĉ, la lerta eldonisto de l' mirindaj ŝlosiloj por ĉiuj lingvoj, pri kiuj ni raportis en la 5^a numero, kiu interŝanĝas la poŝtmarkojn kontraŭ mono sen perdo por la revuoj. Dankon al nia samideano

NUNTEMPAĴOJ

Björnstjerne Björnson

Verkita de NILS ÖKLAND, el Skaare (Norvegujo).

Kiel la plej alta arbo de l' arbaro staras Björnstjerne Björnson inter siaj samlandanoj. Li estas la plej alta kaj la plej vera Norvegano. Li estas vere la plej tipa Norvegano.

Li havas ĉiujn animajn ecojn, kiuj troviĝas ĉe la norvega popolo, la bonajn kiel la malpli bonajn.

Mi tie ĉi donos mallongan priskribon pri lia vivado kaj liaj plej severaj verkoj.

Björnstjerne Björnson vidis la lumon de l' tago la plej unuan fojon en la monta kaj arbara norvega valo « Osterdalen » en la jaro 1832^a. Lia patro estis pastro, viro tre majesteta, kiu regis super siaj parohanoj kiel vera reĝo. Ĉe la sola kaj silenta pastra korto vivadis la juna Björnstjerne dum sia plej frua infaneco. Estante sesjara li kun siaj gepatroj translokiĝis en belan parohon apud granda fjordo ĉe la okcidenta flanko de nia lando, kie la patro akiris novan pastran profesion. Björnstjerne restadis hejme, ĝis li estis dek-unu jara. Tiam liaj gepatroj lin sendis lernejon en proksiman urbeton « Molde ». Laŭ la gepatra intenco li fariĝos pastro.

Li ne estis ia « lumo de lernejo ». Ĉar li tro multe studadis historion kaj verkojn de poetoj. Post kelka tempo li iris en nian ĉefurbon *Kristiania* por fariĝi studento. Tie, en privata gimnazio, li renkontis kelkajn junajn virojn, kiuj malfrue fariĝis grandeguloj en nia literatura mondo, nome *Henrik Ibsen*, *Jonas Lie*, *Aasmund Vinje* k. t. p.

Björnson ne fariĝis pastro. Farinta studentan ekzamenon li akiris metion kiel kunlaboranto je kelkaj gazetoj kaj verkadis multege da artikoloj pri diversaj temoj. Poste li dum kelkaj jaroj direktadis teatrojn en la urboj *Bergen* kaj *Kristiania*.

Dum la jaro 1856, dum li kiel juna studento ĉeestis ĉe studenta kunveno en *Upsala*, Svedujo, ekmaldormiĝis lia poeta forto, kaj mallonge post tiam li verkadis kaj eldonigis sian plej unuan grandverkon, la faman kaj belegan rakonton « *Sönnöve Solbakken* » (*Sönnöve* estas virina nomo, *Sönnöve Solbakken* = *Sönnöve* de la Sunkampo). La rakonto montras vivon de norvegaj vilaĝanoj, kiuj, laŭ l' opinio de Björnson, estas homoj bonaj en animo, puraj en moroj, netuŝitaj de la malboniganta kulturo. Norvega estas la stilo de tiu ĉi libro belega, vere

majstra. La vortoj sonas kiel bruo de ventoj tra profundaj arbaroj. Li verkadis plimultajn vilaĝanajn rakontojn, ekz.: « *Arne* », « *En glad gut* » (Gaja knabo).

De lia poeta fonto ankaŭ fluis *historiaj dramoj* kiel « *Mellem slagene* » (Inter la militoj) kaj « *Sigurd Slembe* » de la historio norvega kaj « *Maria Stuart of Skotland* » de eksterlanda historio.

Al la tuta norvega popolo, per siaj *kantoj* kaj *versaĵoj*, li donis grandegajn trezorojn. La kantoj de Björnson estas kantataj kaj ĉe la palacoj de riĉeguloj kaj ĉe la dometoj de la laboristoj. La plej amata de tiuj perloj de norvega poezio estas la rava patrolanda himno: « *Ja, vi elsker dette landet* »: (Jes, ni amas ĉi tiun landon).

En siaj pli kaj plej malfruaj dramoj, Björnson pentras la nuntempan vivadon. Li estas realisto, sed la idealismo havas fortajn radikojn en lia koro. Li kredas al Dio kiel al « bonega, fortega mistero », kaj li kredas, ke *la bono* estas la plej forta

eco ĉe la homaro kaj en la mondo. Lia amo de l' patrujo estas fortega.

Ekster sia poeta agado li, kiel parolanto kaj ĵurnalisto, okupadis sin por vekti la popolon, anime kaj politike.

Li opiniis ke la unuiĝo inter Norvegujo kaj Svedujo estis por nia lando funto de malhonoro kaj malŝato.

Anstataŭ politika unuiĝo, li revis pri « kultura unuiĝo » inter la 3 nordaj landoj: la « Skandinavismo ». Sed bedaŭrinde, la Skandinavismo nur fariĝis revo, bela, luma revo, kiu ne estis realigebla. — Dum la lasta, grava, feliĉe nur politika, batalado inter Norvegujo kaj Svedujo, B. B. reale ne partoprenis, pro ĉeestado eksterlande. Karakterizaj tamen estas liaj vortoj, telegrafe senditaj al nia ĉefa ministro Michelsen: « Nun ni (nome la Norvegoj) estu unuiĝintaj. »

Li ankoraŭ vivas kaj laboras ĉiuforte. La plej alta arbo de la norvega literatura arbaro ankoraŭ staras, nevenkita de aĝo kaj atakoj, disjetante siajn bonajn semojn.

Speciale por « Tra la Mondo »
NILS ÖKLAND.



BJÖRNSTJERNE BJÖRNSSON.

Niaj politikaj informoj

Ili estis kaj pli kaj pli estos interesaj, ĉar oni kutimiĝas uzi la revuon por diskonigi aferojn, kies priskribo ne decus en propagandaj revuoj, kiuj devas nur okupiĝi pri sia difinita kaj speciala trafotajo; ĉar alie, ili riskus ofendi personojn kiujn, kontraŭe, ili celas esperantistigi.

Tute malsame, la programo de « Tra la Mondo » devigas ĝin aludi tiujn aferojn, simile kiel kiu ajn nacia revuo. Sed, kiel oni jam povis vidi, ni zorgege detenis nin, kaj daŭrigos tiel agi, doni opinion pri la diritaj politikaj aferoj. Ni informos senpartie kaj kiel eble plej ĝuste, kaj limigos nian rolon je tiu konigo de l' gravaj tutmondaj okazintaĵoj per sciigoj de landanoj mem.

Neniu do povas kolereti pri enhavo de la revuo, tiom pli ke se, ian tagon, iu landano juĝas iun informon ne favora por sia lando, alian tagon estos la vico de tiu lando ludi ŝatindan rolon en la granda tutmonda dramo, kies aktoj malvolviĝas laŭvice sur la diversaj punktoj de l' globo.

A. MONTROSIER.

Sangaj elfluoj en Praha.

Letero de BOHEMA ESPERANTISTO.

« Vulkanana tero » oni nomas la boheman ĉefurbon Praha, ĉar la eŭropa publiko neniel konas la pentrandan vidaĵon de tiu ĉi nobla urbo, ĝi ne konas la sennombrajn arkitekturajn, artistajn kaj historiajn memoraĵojn ĉiuepokajn, de l' fama urbo, kiu estis la scenejo kaj la fokuso de l' tutmonde gravaj okazintaĵoj; ĝi ne konas la alte gloran kaj kortuŝe tragedian historion de l' urbo, kiu estis tiel grava en la internacia politiko, dum mezepoko, sed kiu estas maljuste forgesita nun. La eŭropa publiko ekscias pri Praha nur tiam, kiam ĝi estas scenejo de politikaj esprimoj, kiam ĝi multfoje estas scenejo de sangverŝado. Kaj tiam la eŭropa publiko legas terurajn sciigojn el fontoj, kies celo estas skandaligi la urbon per trograndigo aŭ mensogo. Jen kun tolerema rideto, jen kun sentebla doloro, multfoje kun justa kolero, la Bohemoj legas en ia parto de la eŭropa presaro tiajn sciigojn, multfoje pri okazintaĵoj kiuj neniam en Praha okazis, aŭ kiuj havis tute diferencajn motivojn, je tiuj kiujn skribas la kalumniatoj. Similajn sciigojn transportis telegrafo en la mondon en la komenco de tiu ĉi monato kaj la kredema publiko legis pri tio, kiel Bohemoj leviĝis kontraŭ la 6 1/4 % malplimulto germana en Praha, kaj kiel ili atakis la policianojn. Do kio okazis, kaj kio estis la kaŭzo de tiuj okazintaĵoj? Mi esperas, ke verema leganto de tiu ĉi ĵurnalo afable tralegos la priskribon donitan de l' persono kiu vivas en tiu ĉi urbo, kaj kiu ĉeestis tiujn okazintaĵojn.

La esenca parto de la tuta novepoka historio politika de la bohemna nacio estas plenigita per celadoj por atingi justajn elektadajn, regularojn por institucioj leĝodonaj. De pli ol kvardek jaroj batalas la Bohemoj kune kun aliaj nacioj aŭstriaĵ por justa kaj demokrata reprezentado de popoloj en la ŝtata parlamento eĉ en la landaj parlamentoj de apartaj nacioj; de pli ol 40 jaroj la aŭstriaĵ nacioj, precipe slavaj, batalas kontraŭ la elekta regularo ellaborita de germana ministro Schmerling tiamaniere, ke ĝi garantiu la superecon de sferoj privilegiitaj kontraŭ la sferoj pli senhavaj, kaj la superecon de germana nacio kontraŭ la nacioj ceteraj. Por kompreni kiel grandan makulon de ĉiu justeco prezentas la regularo de Schmerling, sufiĉas citi la ekvacion, per kiu unu deputito trafe katarakterizis elektraĵon de diversaj klasoj sociataj: 1 voĉo de granda bienulo = 50 voĉoj de urbanoj = 200 voĉoj de vilaĝano = 1000 voĉoj de laboristoj. Ĉu estas juste, ke 15,000,000 Slavoj estas reprezentataj de 177 (anstataŭ 250!!) deputitoj, dum 9 milionoj da Germanoj havas 203 (anstataŭ 153!!) deputitojn; certe decidus justema leganto mem. Pli terurajn faktojn montrus la detala statistiko. Mi esperas, ke la leganto komprenos, la penadon de la aŭstriaĵ nacioj por akiri la reformon por la ŝtato, eĉ por ĝiaj landoj, laŭ la fundamento de universala, egala, direkta kaj sekreta elektraĵo. Por tiu ĉi postulo plej rezisteme batalis la Bohemoj inter kiuj, precipe lastan tempon, relevis la flagon de l'universala egala elektraĵo la socialaj demokratoj, donintaj tiel la signalon al ĉiuj nacioj aŭstriaĵ, kiuj aliĝas unu post alia al granda demokrata movado por ŝtata egaleco. Tiu ĉi movado de ĉiuj nacioj aŭstriaĵ estis plifortigita de konsento de aŭstrio-hungaraj monarko kun tiu parto de regnestrara programo de ministraro hungara, en kiu estas enhavita la universala

voĉdonrajto por reĝolando Hungarujo, kaj estis plialtigita de sukceso de senekzemplaj bataloj por ŝtata liberaĵo en Rusujo. Por postuli la universalan elektraĵon interkonsentas hodiaŭ la sendube plimulto de la bohemna nacio kaj tiel okazis gravaj malkonsentoj inter la konvinko de bohemna plimulto kaj inter la vidpunkto de aŭstria regnestraro kaj germana malplimulto, kiu ĝis nun kontraŭstaras la postulon de universala elektraĵo, ĉar la Germanoj per ĝia efektiviĝo perdis sian superecon. La movado por la reformo de la elekta regularo elkreskis jam tiel, ke la aŭstria regnestraro decidis proponi la reformon de la elektregularo por la bohemna parlamento. Sed tiu ĉi reformo nur malmulte pligrandiĝus la rajton de la senhavuloj, kaj tial la bohemna laboristaro energie proklamis, ke ĝi akceptos nur la reformon sur la fundamento de la universala kaj egala elektraĵo. Ĉar ĝi ne povas batali por sia postulo en parlamento ne estante en ĝi reprezentata, la laboristaro decidis insisti por sia volo per strataj *elmontraj*. Al la laboristaro aliĝis la studentaro kaj progresema inteligentularo; sed la konservantuloj kaj agrariuloj kontraŭstaras la komunan postulon de l' bohemna nacio. Mi esperas, ke mi sukcesis skizi kompreneble la kaŭzojn de l' movado, kiu povas kaŭzi grandan renverson en Aŭstrio. Kaj nun mi penos tute senpartie kaj senpasje, kiel homo libera de ĉiu ŝovinismo, skizi la sangan epizodon de tiu ĉi batalo.

La Bohema laboristaro kun aliĝinta inteligentularo aranĝis en la tuta Bohemujo, precipe en Praha, centojn da kunvenoj kaj *manifestacioj* por la universala egala elektraĵo. Plej grandan impreson faris la manifestacio la 10^{an} de oktobro, kiam estis malfermata la bohemna parlamento. Preskaŭ 100,000 personoj el la organizita laboristaro kunvenis antaŭ la bohemna parlamento kaj elsendis la deputitaron al la prezidanto de l' parlamento (prince Lobkowitz) kun la petskribo deziranta la reformon de la elektada regularo sole laŭ la fundamento de l'universala kaj egala elektraĵo. Ĉi tiu manifestacio imponanta tiel per la granda nombro da partoprenantoj kiel per modelaj disciplino, trankvilo, sed ankaŭ per sia decidemo, pasis tute trankvile same kiel pasadis la ĉiudimandaĵ kaj lasttempe ĉiutagaj *elmontraj* sur la stratoj de Praha. Sed la grandeco de l' movado, eĉ tute trankvila, ektimigis la aŭstrian regnestraron, precipe kiam, post Bohemoj leviĝis la ceteraj nacioj; kaj ĝi decidis ne plenumi la postulon de l' popolo, sed severe elpaŝi kontraŭ la Bohemoj kaj kiel ekzemplo puni la malamatan nacion, kiu tamen estas la ĉefa apogo de l' monarko. Ja la 3^{an} de Novem. ŝanĝiĝis, laŭ ordono, la konduko de policanaro, kiu perforte disigis la popolon. La 4^{an} de Nov. la bruteco de la polico plialtiĝis, ĝi tute senkaŭze atakis la *elmontrantojn* per *sabroj* en la strato Lazarská ulice, el kiu la popolo ne povis rapide foriri; kaj dum la tuta vespero la policanaro, piediranta eĉ rajdanta, furiozis tra la stratoj de Praha batante senkaŭze per sabroj ne nur la *elmontrantojn*, sed eĉ la okazajn rigardantojn, atakante la popolon sur la trotuaroj, persekutante ĝin eĉ en la domojn. La sekvantan tagon post subĉiela kunveno sur la ĉefa placo (Václavské náměstí) de Praha okazis la scenoj plej teruraj. Kiam la kunvenintoj disradis, la parto el ili trairanta la ĉefstraton Prikop haltis antaŭ la «Deutsches Haus» kaj brue esprimis sian mal-

plaĉon pri la konstruaĵaro de l'germanaj deputitoj — kies centro la germana domo estas — kontraŭ la universala voĉdonrajto. Rigardante tion, kio sekvis, estas necese aldoni, ke similaj protestoj estis faritaj eĉ kontraŭ la diversaj bohemaj politikuloj (inter aliaj eĉ kontraŭ eminentaj scienculoj profesoroj Dr Rieger kaj Dr Maixner, konservantuloj), ke ĉi tiuj protestoj estis direktataj ne kontraŭ la Germanoj, sed kontraŭ la malamikoj kaj kontraŭstarantoj de l'universala elektraĵto. Sed kiam la protestesprimoj ekaŭdiĝis antaŭ la germana domo, la policianoj eliris la sabrojn kaj, sur loko neordinare vizitita, sen ia avizo, ili ekbatis per sabroj la surprizitan popolon. Treege ekscitita kaj koleorigita pro la atakoj de la policistoj la popolo ekkontraŭstaris ilin kaj, estante sen armiloj, ĉirkaŭŝitis ilin per ŝtonoj. Tio estis la komenco de granda sangverŝado. La policianoj eliris la revolverojn kaj — malgraŭ la ordono malpermesanta al policistoj uzi la revolveron en la mezo de l' urbo — ili pafadis al la manifestaciintoj. Baldaŭ la stratoj pleniĝis je policistoj, ĝendarmoj kaj soldatoj (dragonoj); tiuj per sabroj, bajonetoj, revolveroj kaj pafiloj respondadis al popolo petanta sian rajton. La soldatoj elpremis la popolon el ĉefaj stratoj kaj la policianaro persekutadis la disigitajn grupojn kun bruteco, kiu alvokis malaprobon eĉ ĉe la ŝtataj oficistoj kaj eĉ ĉe la konsuloj de la fremdaj ŝtatoj, kiuj raportis pri la brutaleco policana al siaj regnestaroj. Tagmeze kaj vespere tiun dimanĉon Praha estis sceno de bruteco, kiun ĝi malmulte foje vidis, kvankam ĝi tre ofte estas loko de politikaj esprimoj; grandega nombro da personoj, nombro kiu neniam estos konstatita, estis vundita, ĉu grave ĉu malgrave, ankoraŭ pli granda nombro da personoj estis arestita; unu junulo estis per pafado mortigita, unu studento morte vundita; estis vundita kaj arestita granda nombro da homoj, kiuj neniel partoprenis en la *elmontrado*. Tre brute la armita *polenco* elpaŝis kontraŭ la studentoj, kiuj aliĝis al laboristoj. La policistoj persekutadis la studentojn en la domojn kaj lernejojn kaj kiam la alturneja studentaro (studentoj de universitato kaj teknika lernejo) aranĝis en korto de teknika

lernejo grandan studentan protestkunvenon, la soldatoj kun nudigitaj bajonetoj ĉirkaŭis la teknikajn lernejojn kaj ellasis el ĝi pli ol 4000 kunvenintaj studentoj nur post grandaj kaj multaj protestoj. La gazetaro, kiu konstatis la faktojn estis konfiskata, kelkaj el ĝi ĉiutage: la gazeto « Pravo lidu » estis konfiskata sesfoje dum 1 semajno. En Praha koncentriĝis pli ol 1000 policianoj, 700 ĝendarmoj, 8 regimentoj de infanterio, 3 regimentoj de dragonoj, kiu estis alvokitaj la plimulto el aliaj landoj de Aŭtrio kaj ne konis la bohemajn lingvon. Tio kompreneble ne trankviligis ekscititan popolon, kiel ne kvietigis la pasiojn la timiganta afiŝo de policdirektoro Krikava, sed la politikuloj bohemaj, vidinte la danĝeron por senkulpuloj, petis per varmega avizo la popolon ĉesi la batalon en nuna formo, kaj same faris la estroj de la laboristaro, kiuj proklamis la necesecon de universala striko politika. Post interkonsento kun ceteraj nacioj en Aŭstrio, la laboristaro de ĉiuj nacioj aŭstriaj promesis en la tago de la malfermo de la ŝtata parlamento en Wien (28^{an} de Novem) ĉesi ĉiun laboron, provizore dum tiu ĉi tago, sed se la regnestro ne cedus, ĝi strikos tiel longe ĝis la regnestro plenumos la volon de l' popolo.

Gravaj okazintaĵoj atendas Aŭstrion, grandan katastrofon povas kaŭzi la nuna movado. Kiel ĝi finiĝos? La solvo estas en la manoj de la aŭstria regnestro: ĝi aŭ cedos antaŭ la volo de l' popolo kaj la danĝera momento preterpasos tute trankvile aŭ ĝi restos surda kaj blinda por la deziroj de la nacioj, kaj Eŭropo estos mirigata per okazintaĵoj neantaŭvideblaj, per okazintaĵoj, kiuj povas kaŭzi grandan renverson en Aŭstrio. Ĉu la aŭstria regnestro kuraĝos kontraŭstari la justan postulon de la popolo, kiel ĝi faris ĝis nun, aŭ ĉu ĝi ekmemoros la latinan proverbon « Vox populi, vox Dei » kaj plenumos la postulon de la nacioj antaŭ ol la aŭstria laboristaro uzos la teruran kaj sendube efikan armilon — la universala striko politika.

Originale verkita,
de H. Bouška, el Praha (Bohemujo).

Ĉieaj eĥoj.

Politikaj Rilatoj en Hungarlando.

« La hungara nacio kaj ĝia reĝo ne komprenas sin reciproke », — tiun ĉi aferon-gravan aferon-publikigas nuntempe la eŭropa gazetararo. Kiel mi ie ĝin legis, oni pensas ke ĉe ni estos baldaŭ revolucio. Ne, tute ne. Estas vere ke la cirkonstancoj estas tre gravaj; sed la hungara nacia forto ne devas uzi la revoluciajn ilojn por plibonigi sian politikan kaj socialan vivon. Dum la regado de l' Habsburga dinastio, oni senĉese trovas, sur la paĝoj de l' hungara historio, maljustaĵojn, senleĝajn ferojn kaj absolutisman de ĝia parto. Ni tamen ĉiam kontraŭ ĉiuj defendis nian miljaran gepatralandon. La tataj atakoj, la tricentjara turkregado kaj la nomita absoluta potenco de l' Habsburgoj ne povis venki la hungaran nacian forton.

Post la katastrofo je « Vilagos », en la jaro 1849^a, kiam la hungara batalado por la libereco estis malsukcesinta, estis ĝis la 1867^a en nia lando la plej tutplena absolutismo, sed (ankoraŭ la tre maljuna « sed ») la nacia forto ne estis venkita. La ekzemplo de l' tiamaj ekzekutitaj herooj (nombro 13) fortigis la korojn kaj animojn; kaj la nigraj kavaliroj de l' absolutismo estis devigataj forkuregi. Hungarlando denove ricevis siajn liberecon, sendependecon kaj aŭtonomion. La nacio konsentigis kun sia maljuna reĝo. De tiam nur ekzistas la komuna militistaro kaj limdepagregiono.

Bedaŭrinde en la du partojn (hungaran kaj aŭstran) de l' komuna militistaro oni

oficialigis la germanan lingvon. Tiu decido kaŭzis la nuntempajn gravajn politikajn rilatojn, ĉar se ni volonte konsentas pri la komuneco de l' reĝa persono, ni kontraŭe volas, ke nia lingvo estu oficiala en la hungara parto de l' komuna militistaro; ankaŭ ni volas sendependan limdepagregionon.

Tiun ĉi programon havas la delegitoj de l' sendependa partio. La estroj de tiu ĉi patralandama partio estas Francisko Kossuth, kaj grafo Alberto Apponyi. Ili estas niaj trezoroj.

En la lasta delegitelekto tiu ĉi partio ricevis la plej multajn membrojn, kaj laŭ la aŭtonomio, la pli multnombra partio devus formi la ministraron. Tamen la reĝo ne volis akcepti ministrojn el la sendependa partio, malgraŭ la nacia volo; ĉar tiam li devus ankaŭ akcepti la sendependan programon. Jam ok ministroj estis devigitaj ekŝiĝi, kiam la reĝo komisiis la militistan generalon baronon G. Fejervary kiel ministro. Tiu ĉi decido estis tute kontraŭ la hungara aŭtonomio. Ni jam de pli ol unu jaro ne plu havas budĝeton pro la obstrukcio farita de l' gepatralandama sendependa partio, je la espero ricevi kontentigon.

Jen estas niaj nunaj politikaj rilatoj kun Aŭstrujo. Ni ne timas. La *ŝino povas nur esti nia venko*. Tiuj timu, kiuj komencis pligravigi kaj malbonigi la cirkonstancojn. Ni konfidas, ke fine nia maljuna reĝo, pli bone sciigita pri la situacio, kaj aganta kiel la bona patro

de sia nacio, forpelos siajn malbonajn servantojn kaj konsentigos kun la volo nevenkebla de l' nacio.

AUGŬSTO DE MARICH,

redaktoro de l' hungara « Esperanto »
Prezidanto de l' org. kom. de l'

« Socio Hungara Esperanta »

Katalunujo.

Hieraŭ nokte, la hispanaj militistoj sieĝis niajn redaktejojn kaj enirinte en ilin, ĉion bruligis, rompis; en la redaktejoj estis neniu! Ili trakuris la stratojn devigante virinojn, infanojn, kaj malunulinonj ekkrii: vivu Hispanujo!; kaj tiuj, kiuj ne kriis estis vundataj de ili. La provincestro kaj la generalo ĉefa — ridindaj Trepoŝoj — estris la militistaron.

Kiam la popolo indignanta komencis ofendiĝi kaj frapi la oficirojn, tiam la ĝendarmaro eliris el la kazerno kaj atakegis la urbaĵojn!.....

Antaŭ du horoj (mi donas lecionon pri Esperanto je la 11^a horo vespere) la klubo estis fermata. Kial? Ĉar la militistoj minacis sieĝi la ceterajn societojn katalunistajn. Estas do la dua fojo, kiam la kurso Esperanta devas halti en Barcelono dank' al Ŝtato. Ĉe ĉiuj la societoj katalunistaj oni donas lecionojn pri lingvoj kaj sciencoj. Ĉiuj la kursoj estas fermitaj; oni malliberigis la ĵurnalistojn kaj politikistojn katalunajn... La Prezidanto de *Unio* eliris el Katalunujo.

Barcelona, 28^{an} de Novembro 05.

P. V.

La Nov-Zelandaj « Football » istoj en Anglujo.

de C. SNAPE, el Bedford.

Pli kaj pli la ludo « Football » (1) varbas adeptojn en la mondo. Ofte ĝi iĝas sangversiga kaj vundiga, eĉ mortiga. La jena rakonto, pri famaj ludistoj ĵus venintaj en Eŭropon, donas ideon pri tiu pasia ludo.

Hodiaŭ la sportistoj de Britujo nur priparolas la Nov-Zelandon Football'on (piedopilkudon). Sendube ĝi estas la angla nacia ludo; sed niaj kuzoj el la Antipodoj « venis, vidis kaj venkis. » Kiam mi skribas, ili restas kontraŭludintaj dudek klubojn kun neŝanĝa rezultato. Ilia nuna « score'o » estas 630 punktoj kontraŭ 22! Kial ĉi tiu sukcesego? Ili estas viroj de bonega fiziĉo. Sed la niaj ne estas tute malgrandeguloj! Certe ili ĉiam kunludas, kaj ĉiu el ili ĉiam elscias, kion faros iaokaze liaj kunuloj. (Kombineco estas dezireginda en ĉi tiu ludo). Sed neutile estas demandi kial oni venkas nin; ni plibonigu kaj revenku ilin.

Mi ĵus vidis ilin ludi kontraŭ Bedford'o; kaj estis kormovigante vidi la batalon. Kiu neniam antaŭe vidis ĉi tiun ludon sendube kredus ke li vidas sangavidan barakton. Vi ekvidas fortegulon kiu kuras portante la



FAMAJ NOV-ZELANDAJ « FOOT-BALL » ISTOJ.

pilkon; sur lin sin ĵetas tri aŭ kvar sovaĝaj malamikoj: unu lin kaptas ĉirkaŭ la genuoj, alia ĉe la kolo, eble ankoraŭ du ŝajnas provi disŝiri el li la brakojn. Li ekfalas sub amaso el viroj, sed la pilko lerte ĵetita al kunulo, estas ankoraŭ portata al « goal'o ». Ĉar oni faligas la novan portanton, li denove ĵetas la pilkon al amiko, kiu evitante la amason el kontraŭuloj, kondukas ĝin post la goal'on. — La faligitaj? Sendube la

kuracistoj zorgas pri ili. Tute ne! Ili ekleviĝis, kaj kuris por denove atingi la pilkon! Kriegoj de entuziasmo de la miloj kiuj staras ĉirkaŭ la ludejo, al kiuj nevole, ni kunigas niajn. Kiel oni memoras estintajn ludojn; kiel oni bedaŭras la maljunecon, kiu metas nin « sur la breton »!

J. C. SNAPE
(Anglujo)



Eldonado de gazetoj esperantaj.

Ĝi ja estas *sporto*, kiu postulas aron da ĉiuj ecoj necesaj por la diversaj sportoj; lertecon, por scii interesi la leganton, rezistecon por elporti multajn horojn sendormajn, ĉar, krom tute maloftaj esceptoj, redaktoroj kaj administrantoj estas homoj havantaj tagajn okupadojn; malavarecon, por riski, en aventuro tre hazarda, sumojn pli grandajn ol tiuj, devigataj por ekzercado de l' plej kostaj ludoj: ĉaso kaj « polo » (ĉevalpilkado) ekz.; sindonon kaj konstanton por ne senkuraĝiĝi, kiam oni vidas la penadojn ne rekompencatajn de sukceso.

Kaj pli ol ni ajn, eĉ la plej danĝera, ekz. la ofte mortiga futbalo, la priparolata sporto havas siajn suferantojn: kiom da esperantaj revuoj jam mortis, tamen tute interesplenaj; kaj jen la konata « The Esperantist » kiu siavice, malgraŭ sia lerta direkto, ĉesas aperi. Ĝi ja ne tute mortas, ĝi kunfandiĝas kun la bonega « British Esperantist » kaj ni havos la plezuron ankoraŭ legi la « humor » an stilon de nia sprita kaj fervora kunfrato, S^o Bolingbroke Mudie.

Tamen ne sen maldoĉeco mi vidas malaperi la unuan anglan esperantan revuon; kaj mi komprenas la nekuraĝigojn kaj avertojn donitajn al mi de S^o Bolingbroke Mudie, kaj mi devas ĝin konfesi, de ĉiuj redaktoroj de esperantaj eldonaĵoj, kiam mi konigis al ili miajn projektojn.

(1) Elparolu « Futbol ».

Anoncado en esperantaj revuoj.

Finante sian adiaŭon al la legantaro de « The Esperantist », S^o Bolingbroke Mudie elkribas la deziron ke la nova angla revuo havu multajn legantojn kaj *anoncojn*.

Tio ĉi certigas kion ni diris en nia lasta numero.

Estas ankaŭ *sporto*, nun, anonci kaj reklami en niajn revuojn kaj la sportistoj estas, ho ve, tre malmultaj.

Tamen, tiuj, kiuj uzas Esperanton por konigi siajn komercaĵojn, ĝenerale ne ĝin bedaŭras. Mi citos nur la ageman firmon « Esperanto Agency » en Glasgow, kies unu el la direktantoj, S^o R. M. Buchanan, skribis al mi por min rimarkigi, ke mia artikolo ne rilatas lian firmon kiu, de longe, helpis diversajn revuojn per reklamo; kaj li aldonas, ke, tion farante, li trovis tre kontentigan profiton.

Volonte mi konsentas kun S^o Buchanan, kaj mi ĝojis vidi ke ĉiuj partoj de « Tra la Mondo » estas legataj interese kaj juĝataj atendindaj. Mi deziras al la visko, cigaroj kaj cigaredoj de l' visko kaj *tabacco syndikato* ĉiam pluan sukceson.

Varbado de Esperantistoj.


Tiu tute sendanĝera sporto estas iam glora. Precize S^o R. M. Buchanan sendis al ni, antaŭ nelonge, abonon de tre potenca kaj influa Hina Mandarinino je « Ruĝa butono » esperantigita de lia frato, ŝipoficiro. Gratulojn kaj dankojn al la du fratoj. Tia sukceso povu antaŭenirigi nian aferon en la flava lando.

A. M.

Artista kaj literatura Vivado.

Islando. — Matthias Jochumsson.

La 22^{an} de novembro estis la islanda poeto *Matthias Jochumsson* sepdekjara. De longa tempo li estas sen ia kontraŭdiro la «laureato» de Islando kaj li aliriko estas pleje ŝatata de ĉiuj Islandanoj. Liaj versoj havas ian apartan forton, kiu



faras plej efikan impreson sur ĉiun islandan orelon, ĉar li estas tre granda majstro en la uzado de la islanda lingvo kaj la malfacila islanda rimo. Sed lia forto ne estas nur en la formo, sed eble ankoraŭ pli en lia homama sentemo kaj optimista vivo-percepto, lia forta religieco kaj profunda pensemo, kaj laste sed ne malpli en lia riĉega fantazio, kiu eĉ ofte lin forportas tiel malproksimen, ke estas malfaci-

le lin sekvi. En libreto eldonita kaŭze de lia jubileo unu el la junaj poetoj islandaj tial skribas interalie, pri lia poezio.

«Estas malnova ideo, ke la poetoj rajdas sur ĉevaloj kun flugiloj tra la aero kaj maro. Sed kiel estas la poeta ĉevalo de M. J. ? Ĝi estas furioze rapidega kaj kurema ĉevalo, povanta belege kuri, sed malmulte dresita, tremanta de energio kaj kun flagrantaj kolharoj, antaŭdifinita akiri unuan premion en ĉiu konkurskuro, se li nur povas konservi la saman kurmanieron de la komenco ĝis la fino.

M. J. provis sian bonegan ĉevalon sur diversaj vojoj. Sed kie li kuras plej bone ?

Ne sur la ordinaraj stratoj malsupre en la valo. Tie li certe kuras bone, sed ne bonege. Pli bone liaj ecoj aperas sur ŝtonplenaj montaj vojoj. Sed plej bone li kuras, kiam li puŝas per la hufoj la montajn pintojn, ekmovas la flugilojn kaj rapidas sur la aeraj vojoj. La ĉielspaco estas lia plej preferinda kurkampoj.

M. J. devas rapidi tra tempo kaj spaco por vidigi siajn plej bonajn flankojn. Liaj pentraĵoj estas farataj per malmultaj klaraj penikstrekoj kaj por bone verki versojn li devas havi grandiozajn temojn. La plej grandaj enigmoj de la homa vivo estas la ĉefa objekto por lia pensado kaj intereso. »

Li estas la plej populara islanda poeto, kiu nun vivas kaj la himno, kiun li faris por la 1000 jara jubileo de Islando (1878), preskaŭ fariĝis nacikanto de Islandanoj.

Krom la originala verkaro (kiu krom la liriko ankaŭ enhavas kelkajn dramojn kaj epopeojn) li faris tre grandan servon al la islanda literaturo per majstra transplantado en islandan lingvon de kelkaj ĉefverkoj el la mondliteraturo (Manfred de Byron; Macbeth, Hamlet, Othello, kaj Romeo kaj Julineto de Shakespeare; Brand de Ibsen k. a.)


Se oni pripensas, ke Islando havas nur 80,000 loĝantojn kaj se oni aldonas la Islandanojn loĝantajn en Ameriko, ĉiuj Islandanoj tamen nur fariĝas, ne pli ol 100,000, tiam oni ne povas atendi ke ĉe ili estas facile akiri sian vivtenon nur per okupado je poezio. Tial ĉiuj islandaj poetoj devas havi ankaŭ ian alian profesion. M. J. estis pastro, sed malgraŭ lia profunda religieco tio lin iom ĝenis, ĉar lia liberala animo iom ribelis kontraŭ kelkaj el la dogmoj de la eklezio. Sed antaŭ kelkaj jaroj la islanda parlamento donis al li poctan salajron tiel grandan, ke li povis ekŝigi el sia ofico kaj oferi tutan sian tempon kaj forton al la poezio kaj literaturo. Ankoraŭ li estas juna en animo kaj oni ne povas vidi ian signon de kadukeco malgraŭ liaj sepdek jaroj.

Т. Н., el *Rejkjavik*
(Islando).

Flagri (El *Wörterbuch Esperanto-Deutsch*; germ. *flackern*; fr. *ondoyer*.)

Rusujo. — Leo Tolstoj.

La 20^{an} de aŭgusto plenumiĝis la 77 jaroj de l'tagnasko de l' glora rusa verkisto Lev. Nikolajeviĉ Tolstoj kiu ankaŭ estas nia Samideano. Ĉi tio donis ideon al rusa gazetaro dediĉi kelkajn vortojn al nomo de konata saĝulo kaj preparoli pri liaj



socialaj kaj politikaj pensoj. Certe de multaj estas sciata, ke pensojn de Lev. Tolstoj pri elliberiga movado, kiu ĉirkaŭprenis tutan Rusujon, kontraŭiras opiniojn regnantajn en nuna momento ĉe la batalantoj de rusa inteligentularo, pri libero de sia patrujo el la manoj de l' tutpotenca burokrataro; tamen ĉi tio neniel signifas, ke la originala verkisto estas kontraŭulo de progreso, ke li ne staras por libero kaj vero de sia popolo. Ne, li estas apostolo (oni povas diri apostolo de paco) kiu bataladas por vero, libero kaj bono de fratoj-homoj; nur li alvenas al tiu konkludo per alia vojo kun sia moralo pri interna renaskiĝo de la homo. Certe l' aŭtoro de «Milito kaj Paco», de «Reviviĝo» kaj de aliaj verkoj profunde kredas, ke nur tiam alvenos feliĉaro de homaro, kiam la homo interne renaskiĝos ĉar, laŭ Tolstoj, «regno Dia estas interne de ni.»

Ni ekdeziru de tuta koro kun rusa gazetaro al la granda verkisto tutaj bonojn; ke li laboru sur la literatura vojo dum multaj jaroj por la bono ne nur de Rusoj sed de l' tuta homaro. Bedaŭrinde la Rusoj ne havas la eblecon legi tutajn verkojn de l' tutmonda verkisto. Povus rapide alveni la tempo, kiam la granda saĝulo povos presadi kaj eldonadi siajn verkojn en Rusujo kaj kiam la Rusoj ricevos eblecon libere presi kaj propagandadi liajn pensojn en rusajn ĵurnalojn kaj gazetojn, ne kalkulante kun severaj cenzuraj kondiĉoj kaj l' arbitro de tutpotencaj burokrataj oficistoj. Ĝi alvenu!...

A. PORFIRJEV (Rusujo).

La Franca Pentrarto en Londono.

La klasika pentrarto montras sin tre ĉarma ĉe la nuna ekspozicio de la akvopentraĵoj de Sinjoro Henri Harpignies en la Leicester-a galerio. En 1860 li estis intimo kaj kunvojaĝanto en Italujo de Corot: Millet, Rousseau, kaj la ceteraj samtempaj artistoj estis liaj amikoj. Sed, eĉ inter ili, li staras kiel aparta kaj distinginda persono: ĉar la gloro de la franca deknaŭcent-jara pentrarto estas en tio, ke ĉiu pentristo havis sian propran ekzercokampon kaj sian propran esprimmanieron. Oni ne povas klarigi kial Millet estas samepoka kun Corot, aŭ kial Diaz, Rousseau, kaj Monticelli estas grupigitaj de la dato kaj aliaj cirkonstancoj kun Harpignies. Oni nur povas rakonti ke la diino Fortuno dum multaj jaroj tre malŝpareme donacis al Francujo virojn alte artinspiritajn.

El la «ILLUSTRATED LONDON NEWS» de Novemb. 11^a, 1905.
Sendita de THE REV. J. C. RUST, Soham., Anglujo.

Hispanujo. — Francisko Navarro Ledesma.

La 20^{an} de septembro subite mortis en Madrido la eminenta literatura profesoro de la tiea instituto S^o Francisko Navarro Ledesma. Kvankam li estis nur 36-jara lia famo kiel verkisto kaj kritikisto estis plej altestimata kaj ĝenerala. Li sin montris en siaj verkoj plej profunda konamo de la hispana kaj klasikaj lingvoj. Lia lasta produktaĵo «La sprita junkro Mihaelo de Cervantes Saavedra» estis tre ŝate akceptita de la hispana publiko. Li mortis ne atendite, kiam post esplora vojaĝo en kelkajn kastilajn provincojn, li pretiĝis verki fundamentan libron pri la impresoj de sia veturado Pacon al la tro frue mortinta literaturisto!

VICENTE INGLADA, Murcia.

« Germana esperantisto » kaj germana propagando. Internaciaj enketoj. Tutmonda jarlibro Esperantista. Esperantaj kursoj.

« Germana Esperantisto » kaj germana propagando.

La novembra kaj decembra numeroj de tiu bonega revuo aportas al ni pleje interesajn sciigojn.

Kiom da fojoj ni legis en ĝi pri la indiferenteco de la germanaj gazetaroj kaj publiko. Nu, tute malsaman arion kantas la kronikisto: multaj paroladoj estis farataj kun sukceso kaj sekvataj de malfermo de multaj kursoj; multenombraj germanaj gazetoj, ĉu skeptikaj, ĉu kontraŭaj, decidigis fine favore raportoj por Esperanto kaj pri la Bulonja kongreso.

Tiu lasta havas grandan parton en tiu ŝanĝo de l' spiritoj. Do en Germanujo kiel en aliaj landoj, nia granda manifestacio ne estis senfrukta. Ni do ĉion faru por ke la estonta estu « grandioza » laŭ la propra esprimo de D^{ro} Zamenhof; kaj por tiu ni unuĝu.

Tiun necesecon bone komprenis la distinginda redaktoro de « Germana Esperantisto », S^{ro} J. Borel, kiu, de la naskiĝo de tiu revuo, sub la nomo « Esperantistische mitteilungen » aliris la atenton de nia kolegaro.

Ili denove priraktas la demandon pri kuna organizado en Germanujo. Tre kore ni deziras, ke lia voĉo estu aŭdita kaj lia alvoko respondata, ĉar vere la germana propagando nur povos gajni se la larĝspiraj konsilioj de S^{ro} J. Borel estas sekvitaj.

Inter la personoj sin okupantaj pleje por nia afero en Germanujo, ni citu:

Pro^o Christaller kaj S^{ro} Eberle en *Ulm*; D^o Mybs kaj S^o G. Heitich, en *Altona*; S^{oj} Wallon, Prezo, Christoffel kaj Schuck, en *Braunschweig*; la lasta preparas, por la grupo, « albumon de eminentaj Esperantistoj » (1); S^{oj} Kuchler, Barthel kaj D^o Hannover en *Frankfurt a. M.*; D^o Bab, kiu komencas serion de paroladoj, Schöner, kaj J. Borel, ankaŭ paroladintoj, en *Berlin*; S^{oj} Schröder, Ahlgrimm, Hans Romanowicz en *Wien*, la 1^a faris ankaŭ paroladojn en *Berlin* kaj *Schwechat (N. Aŭstr.)*; S^{oj} Wilhelm Heller kaj Roschig (eksvolapükisto) en *Teplitz*, kie nia sindona kunlaboranto Pro^o Otto Simon paroladis kiel en *Leitmeritz*; en *Salzburg*, la fama Leipziga profesoro, D^o Ostwald, faris paroladon kiu tre miregis la aŭdantaron kaj dispelis la antaŭjuĝojn de multaj; S^{oj} Rüdiger kaj Ernst Schorn en *Jena*, kaj ankaŭ S^o Havelka, kiu nun loĝas en *Barmen*; S^{oj} Fritz kaj Eduard Wenk, kaj Alf. Bader en *Basel*; S^o Schauerhammer kaj D^o Blachstein en *Leipzig*; k. t. p.

Ni devas multe ĝoji vidante tiun aktivecon, fine helpatan de la germana gazetaro.

Internaciaj enketoj.

Kiel, en Anglujo, Francujo, Germanujo k. t. p. oni instruadas, juĝadas, vojaĝadas? Kiel estas organizitaj la laboristaro, la militistaro, la maristaro? Kiuj estas hejmaj kutimoj? — Tiujn aferojn oni ne povas tre bone koni per libroj, ĉar la instituciojn kaj la kutimojn de ĉi lando sufiĉe konas la loĝantoj en ĝi kaj tial, malmulte bezonas librojn pri ili. Cetere libro, ekzemple germane skribita pri la germanaj askurantaj societoj, estus tre malfacile komprenata de alilandanoj, ĉar oni trovas en ĝi multajn vortojn teknikajn netroveblajn en komuna vortaro kaj aludojn pri diversaj enlandaj leĝoj aŭ institucioj ankaŭ tute nekonataj de la leganto.

Nu dank' al Esperanto, oni povas nun facile respondi multajn tiajn demandojn, kiujn generale oni povis antaŭe studadi nur per multekosta ĉeestado en fremdaj landoj.

Tiaj esploroj enestas ja en la programo de « Tra la Mondo » kaj ni volas komenci enketojn en kiuj ĉiuj niaj legantoj povos partopreni kaj kies sukceso taŭge montros ĝin don de Esperanto por la universala informado.

Ni do petas niajn legantojn ĉiulandajn ke ili bonvolu laboradi kun ni sendante al ni raportojn kiel eble plej detalajn pri la demandoj tie ĉi faritaj. Ni legos atente tiujn raportojn kaj ni enpresos plene aŭ resume tiujn, kiuj ŝajnos la plej interesaj kaj la plej plenaj.

Plie, ni petas ĉiujn niajn legantojn ke ili sciigu nin kiujn aferojn ili deziras koni prefere; oni sendu ĉiujn raportojn kaj demandojn al S^{ro} Th. Kousseau 1, faubourg de Bouze à Beaune Côte d'or, Francujo.

Ĉar la artikolo de S^o Alois Stepan pri la Bohemaj infano kaj lernejo multe interesas kaj nin ricevigis kelkajn aliajn atentindajn sendaĵojn, ni komencos nian enketaron per studado pri la instruado en la tutmondo.

La vivado en la edukejoj.

Ni petas ke niaj legantoj bonvolu klerigi nin pri la edukejoj privataj kaj publikaj, urbaj kaj kamparaj, ĉu por junuloj, ĉu por junulinoj, ĉu por gejunuloj. Tiujn edukejojn oni povas dividi je kvar klasoj.

1^e) La edukejoj por la infanetoj du = ĝis sepjaraj pr ksimume; oni povas nomi ilin infanetejoj.

2^e) La edukejoj unuagradaj por la geknaboj sep = ĝis dekjaraj proksimume;

3^e) La edukejoj duagradaj por la junuloj dekonu = ĝis deknaŭjaraj proksimume (gimnazioj, liceoj, kolegioj, tekniklernejoj, k. t. p.);

4^e) La edukejoj trigradaj aŭ superaj (universitatoj, superaj kaj specialaj lernejoj, k. t. p.);

Ni demandas nenion pri la ĥeima edukado. Priskribu al ni la tutan tagon de edukato (junulo aŭ junulino) el tiuj ĉi kvar klasoj de edukejoj de via lando kaj diru al ni precipe:

1^e) Ĉu ĉiu internulo (edukato loĝanta kaj manganta en la edukejo) havas ĉambreton por si sola, aŭ ĉu la internuloj kuŝas multope en la sama dormĉambrejo?

2^e) Ĉu la junuloj devas bani, pluvbani kaj kiom ofte? Ĉu estas banĉambroj, ĉu la edukatoj devas fari ĉiutage gimnastikon ĉu en ĉambro, ĉu en gimnastikejo?

3^e) Kie ili ludadas? Ĉu en ĉambrego, ĉu en korto, ĉu en parko? Ĉu ili ofte promenas eksteren? kiu gardas ilin dum ili ludadas? Ĉu la gardistoj ludas kun ili?

4^e) Kiu hore estas la manĝoj? kion ili konsistas? ĉu la gardistoj, instruistoj, aŭ profesoroj manĝas kun la junuloj?

5^e) Kiom liberaj estas la edukatoj en la dormĉambregoj, dum la ludoj aŭ dum la manĝoj? ĉu ili estas alpermesitaj interparoli, fumi k. t. p.?

6^e) Kiuj estas la libertagoj? ĉu la internuloj povas ofte eliri el la edukejo? ĉu solaj? ĉu nur kun siaj gepatroj? Kiam estas la libertempoj kaj kiom ili daŭras?

7^e) Ĉu la gepatroj de la edukatoj povas ofte veni en la edukejon? ĉu oni ebligas ilin partopreni la edukadon kaj kiel?

Fine, ni petegas ĉiujn niajn legantojn, kaj precipe profesorojn, edukejestrojn, instruistojn kaj eĉ edukatojn ke ili bonvolu respondi al ni: ju pli multaj estos la respondoj des pli plena estos nia informiĝo pri tiuj interesaj demandoj.

Tutmonda jarlibro esperantista.

Je la momento kiam komencas nova militiro por Esperanto, ni devas alvoki la atenton de niaj legantoj pri bonega armilo: la *Tutmonda jarlibro esperantista*, eldonata de la firmo Hachette. Jam estas preparata de So de Menil la tria eldono; kaj estas devo por ĉiuj Esperantistoj fari ĉion eblan por ebligi eldonon tiel plenan kaj perfektan kiel eble. Dum la kongreso kelkaj personoj rimarkigis ke la jarlibro enhavas kelkajn erarojn kaj mankojn. Kiel tre prave respondis ŝofe S^o Carlo Bourlet, Prez^o de l' Pariza grupo, tia verko devige ne povas esti perfekta pro ĝia naturo mem. La 2^a eldono montras jam gravan progreson rilate la 1^{an}; kaj dependas de Esperantistoj ke la 3^a estu preskaŭ perfekta.

Ni instigas ĉiujn naciajn foliojn, per perilo de Esperantistoj, enpresi alvokon similan al jena: « Celante preparon de *Tutmonda jarlibro esperantista*, ĉiuj Esperantistoj estas petegataj sendi siajn nomon, profesion kaj adreson, tre zorge skribitajn, al S^o de Menil, 46, Boulevard Magenta, Paris. Ili komprenu ke, tiel agante, ili potence helpas la aferon Esperantan al kies sukceso ili estas interesataj ».

Niaj kunfratoj bonvolu, se ili konsentas kun ni, enpresiti tian alvokon al siaj gelegantoj.

Esperantaj kursoj.

Ĉiam ili multobligas. Tiun ĝojigan sciigon oni ĉie legas en la propagandaj revuoj. Franca *Esperanto* aparte, ĉiam tiel bone informita, enhavas multnombrajn nomarojn pri tio.

Specialan citon meritas la kursoj organizitaj en Parizo, pli ol 50, la plimulto dank' al l' aktiveco de S^o Huet, speciale komisiita por tiu grava ofico. Ja ĉarmata, mi estis antaŭnelonge, vidante sur la muroj, en ĉiuj kvartaloj, verdajn afiŝojn anoncantajn « Kursojn pri Esperanto ». Dankojn kaj gratulojn al organizanto kaj profesoroj, tiuj bonegaj laboristoj pospersantaj.

STELETO.

(1) La specimeno, kiun ni ricevis estas vere promesplena pri la intereso kaj la beleco de l'albumo.

Jen estas la malvarmaj tagoj dum kiuj oni plezure skuĝas por kontraŭbatali la malvarmon. Ili do dancu, la ge=blond=brun=grand=gras=... k. t. p. uloj, la amuzan kaj senfinan dancon de nia fervora kaj talenta amiko, aŭtoro de tre bela muziko por « La Vojo » de nia kara majstro.

R. DESHAYS.

Al Fraŭlino Paule Baudoin.

Sinjoroj

Venu, la belu - li - noj! Belaj Sinjoroj venu!

Sinjorinoj

Sroj

Dancu ni ronde ĉi - uĵ! Ĉiuj ni ronde dancu!

Sinoj

Ĉiuj gesinjoroj

ni estas junaj, ĉarmaj Vi estas: Se Vi nin amas, Kisu Vi nin!

Venu, la blondulinoj!
2^a Vico. Blondaj Sinjoroj, Venu!
k. c.

Venu, la brunulinoj!
3^a Vico. Brunaj Sinjoroj, venu!
k. c.

Kun granda, eta,
perla, rozga, grasa, seka.... laŭ
[vole.]

DIVERSAJ SCIIGOJ.

Esperantista organiza komitato.

En nova cirkulero, tiu komitato sciigas siajn projektojn, kies legado montras la seriozan pripensadon, kaj kiuj celas helpi kiel eble plej multe la diskonigon kaj disvastiĝon de Esperanto, kaj ankaŭ starigi modelan informejon malfermitan por ĉiuj.

Por realigi tiun tiel laŭdindan kaj kuraĝigindan programon, la CENTRA OFICEJO jam kolektis, 51, Rue de Clichy, Paris, en sia legoĉambro *Bibliotekon* enhavantan la ĉefajn esperantistajn jam elirintajn verkojn; *Kolekton da revuoj kaj gazetoj esperantistaj*; *Bibliografiajn katalogojn* pri la esperantistaj verkoj (libroj kaj artikoloj de gazetoj kaj revuoj); *Specialajn katalogojn* pri la ĉiuspecaj sciigoj interesaj por la Esperantistoj.

Oni vidas ke la centra oficejo ne perdis sian tempon; kaj tiu agemeco estas sendube ŝuldata al la sekretario, S^o Chavet, kiu daŭrigas la agadon fruktoportan kiun li dediĉis al Esperanto, kiam li fondis (1) la unuan francan esperantistan grupon.

Kompreneble ĉio tio ne iĝas sen mono. Ĝis nun la esperantista centra oficejo estas subtenita de kelkaj amikoj de Esperanto sed estas antaŭvidebla ke helpo de pligranda nombro estas necesa por certe daŭrigi ĝian ekzistadon.

Ĝiaj fondintoj intencas fondi, se estas necese, specialan Societon de Amikoj aŭ protektantoj de Esperanto, kiu sin okupus pri la direktado de tiu oficejo.

Atendante la momenton, kiam ili povos sendi alvokon por tio, al ĉiuj Esperantistoj, la fondintoj de la oficejo treege dezirus koni, de nun, la nomojn de tiuj kiuj, aprobantaj la programon supromontritan, volus helpi tiun entreprenon.

Ni ne tro sciis insisti, kompreneble apud tiuj, kiuj ĝin povos, por ke ili de nun, sendu sian alĝon al la kreota societo.

Tia entrepreno, tute sendependa de ĉiu ajn grupo Esperantista, elpensita laŭ plano vera plena kaj metoda, kaj tiel fruktoportebla por nia afero, estas ja inda de l' intereso de ĉiuj kaj de l' subteno de ĉiuj kiuj povas iom monoferi por Esperanto.

Rusujo.

D^o Zamenhof skribis tre belan leteron al la franca Ministro de l' Publika Instruado por lin danki pro lia aligo al la rangoj de la Honora Legio. Finante li diras:

« Mi permesas al mi esperi, ke Francujo estos la unua kiu enkondukos, en la publikajn lernejojn, la instruadon de lingvo, kiu faciligos kaj disvolvos sentime la rilatojn inter ĉiuj popoloj kaj, sekve, certigos la propagadon de la liberalaj ideoj, kun kiuj la nomo de Francujo estas nedisigeble ligita ».

L. L. ZAMENHOF.

Ni esperu ke tiu pera alvoko estos aŭdita kaj ke, iun tagon ne tro malproksiman, Esperanto eniros oficiale en la programojn de l' publikaj lernejoj.


Esperanta gazetaro.

Forgese ni ne citis sur la 4^a kovrila paĝo de l' No 5, en plena nomaro de l' esperantaj gazetoj, « Espero pacifista ». Ni tro favore parolis jam kelkfoje pri ĝi por ke la legantoj de si mem ne plenigis la nomaron.

Mi ankaŭ, nevole, ellasis la folieton « Alĝeria Stelo ». Mia agado, jam forgesita, je la naskigo de tiu revueto estis tro grava kaj efika, por ke mi ne skribu almenaŭ ĝian nomon en tiun restantan mallargan spacon.

A. M.

(1) En Louhans.



ĜENERALA VIDAĴO DE L.

Mondfan

De Profesoro

Esperantistoj ĉiulandaj, kiam vi travojaĝos Francujon, ne forgesu viziti longe unu el la plej potencaj fabrikejoj de la tutmondo. En la centra parto de Francujo, en la departemento de « Saône et Loire » je 400 kilometroj de Parizo, pli kaj pli kreskadas la fama *Creusot*, vastega fera ĉefurbo, tiel bone konata en ĉiuj kontinentoj.

Ĉe la flankoj de preskaŭ nuda monteto, la urbo iomete severa kaj karbenigra dissemas la domaron, kie nuntempe vivadas proksimume 35000 loĝantoj. Malsupre, longa *kavaĵo* (fr. *creux*, *Creusot*) kie la fabrikejo prezentas ne kalkuleblajn kamentubojn altajn, similajn altegaj kandelegoj. Nokte, lumetoj ĉien supreniras kaj la ĉielo estas ruĝa; tage, antaŭ la suno, grandega malhela nubo etendiĝas, kaj la ĉielo estas fuma. Senintermanke, surdigema bruado de frapiloj, fajfiloj, maŝinoj, vagonaroj. Kelkafoje la tondra voĉo de la pezega pistilo je centtunoj.... (1).

En tiu ĉi loko la karbo estas eltrovita de 1502, sed longatempem la ekspluatado ne multe estis grava. Tamen en la fino de la dekoka centjaro, oni starigis fandejon, altfornegojn kaj kristalejon (2). Iom post iom pligrandiĝis la eltirado de la terkarbo, kiu, mezepoke, estis kulpigita difekti la aeron kaj kaŭzi malsanojn. Eĉ, en Parizo, forĝistoj pagis monan punon aŭ estis malliberigataj pro la karba uzado. Ĝis 1836, malgraŭ la penadoj de diversaj kompanioj, la fabrikejo ofte bankrotas kaj malprosperas. Tiun jaron, *Le Creusot* kalkulas nur 2700 loĝantojn. Tiam S^{roj} *Eugène* kaj *Adolphe Schneider* aĉetis la malriĉan fabrikejon, kiu konkuris hodiaŭ kun ĉiuj fabrikejoj de l'Universo.

Glora estas precipe la nomo de *Eugène Schneider* (1805-1875), kiu kreis, se oni povas uzi tiun ĉi vorton, la *Industrian ĉefurbon* de l' moderna Francujo, kiu iĝis prezidanto de la deputitĉambro kaj kies juste staras la bela statuo de « *Chapu* » (3) sur la

granda urba placo. Kiam mortis tiu ĉi agema estro, ĉio, en *Le Creusot*, estis aliformigita; kaj nature sekvis la montritan vojon liaj du posteuloj: *Henri Schneider* (1875-1898) kaj *Eugène Schneider* (1898...).

Hodiaŭ, 15000 ministroj, laboristoj, oficistoj, kiel ĝoja abelaro, zumigas la fabrikejon longan je 4 kilometroj, uzantan kvin = aŭ sesdek vagonarojn ĉiutage. Forigu ilin kaj *Le Creusot* ne ekzistos plu. Dank' al la inteligentaj klopodoj de la *Kompanio Schneider*, la malbela iama vilaĝo nun posedas larĝajn rektajn stratojn kaj longajn bulvarojn bone beligitajn, publikajn verdajn ĝardenojn, multnombrajn lernejojn inter kiuj grupo por supera instruado, rimarkindan hospitalon (1894), trankvilan domon por gemaljunuloj (1887) k. t. p. Nun vastiĝas moderna urbo kun arbaro, kolonaro de kamentuboj senĉese, eterne fumigantaj.


Ni eniru en tiun ĉi Imperion de *Fero*, kie regas la reĝa moŝto, *Fajro*. Jen estas la putoj profundaj je 300-400 metroj kiuj produktas pli ol 100000 tunojn da terkarbo, (apenaŭ la kvinona parto de la konsumo). Jen estas la kvin altfornegoj, inter kiuj la lasta (1898), funkciadinte de la kvina horo vespere ĝis la morgaŭa tagmezo, fluigis 17000 kilogramojn da ferfandajo. Intersekve ni trapasas la laborejojn de ŝtalaj, kupraj konstruaĵoj por lokomo tivoj, ŝipkaldronegoj, tuboj, pontoj k. t. p. kaj la artilerian laborejon, kie montriĝas paflegoj diversformaj, diverslongaj kaj kuglegoj brilaj, nikelaj, kiuj similas al strangaj cigaroj aŭ cigaringoj.

Tie ĉi la laboristoj fabrikadas ferradojn kiel la panistoj knedas la panradojn. Tie, sub altaj vitraj konstruaĵoj, regas la mistera kaj nebrua *Elektro* (4).

Pli kaj pli ŝangebla kaj eksterordinara iĝas la promenado tra la brua forĝejo. Ekzemple, en tiu ĉi vera Infero, inter laboremaj demoŝoj, metala senforma maso estas prenita per kolosaj preniloj, al-

(1) Tuno egalvaloras 1000 kilogramojn.

(2) Ĝi ne ekzistas plu de 1832.



FABRIKEJOJ « LE CREUSOT »

Fabrikejo

ORD (Francujo).

tirita per rulanta ponto kaj venkita, aliformigita, dividita per maŝinoj kiujn nigraj silentaj ŝvitantaj estaĵoj lerte direktas.

Ankoraŭ pli impresa, la spektaklo de la trempado de la ladoj necesaj por la kirassĵipoj. Kiel fajra murego, la lado eliras el la fornego. Subite, ĝi subakviĝas. Batalo inter l' akvo kaj la fajro. La fajro ekstremetas, iom post iom estingiĝas. Kontraŭe la akvo rapide bolas. Fine, la trankvileco, la silento, la paco. Nun fortega, trempita, malvarma kuŝas la lado....

Sed nenio egalvaloras la fluadon de l'aciero « *Bessemer* » aŭ « *Siemens-Martin* », kiu kreas la universna famon de la kompanio. Maŝinoj strangaj per timegindaj pulmoj, furiozege blovdas aeron en la altfornegoj. Mirinde! el retortego renversita eliras, kiel ora ondo, la metala fluidaĵo. Oni vidas fajran Drakon, brilajn artfajradojn, pluvon el blankaj bluaĵ argentaj fajreroj. Kelkajn minutojn, kaj ĉio malaperas en la buŝegon de modeliloj....

Por tiu ĉi neteknika verketo, neŭtila restus la kalkulo de ĉiuj metiejoj kaj oficejoj de la fabrikejo. Sufiĉe estas diri ke *Le Creusot* estas vera mondo, vera ŝtato, kiu havas ĉiujn radojn de inteligenta maŝino kaj la tutan perfektecon de grupo homa kiel eble plej civilizita. Ni citu kelkajn ekzemplojn de la ĝenerala organizado Ĉiujare la kompanio *Schneider* disdonas pli ol du milionojn da diversdo. nacoj. Ĝi pagas po 5 % la malgrandajn ŝparitajn sumojn de la gelaboristoj; multe favoras la aĉeton de beletaj domoj; luigas pli ol 1300 loĝejojn kun ĝardenoj po prezo monata malmultege kosta (1 f. 25 ĝis 8 f.); organizas pensiojn tre facile akireblajn de ĉiuj; funkciadigas senpage medicinan regularon k. t. p. Tial la strikoj estas tute maloftaj kaj la laborista loĝantaro prezentas al la vizitanto ĉiujn kompreneblajn simptomojn de la bonstato kaj de la kontenteco.

Ni memoru ke la plimulto de la Ŝtatoj en la tutmondo faras gravajn mendojn koncernante la armilaron kaj la ŝiparon. Plie, tiuj ĉi Ŝtatoj, ekzemple Bulgarujo, Ĉilio, Japanujo, Rusujo, Ĥinujo, Hispanujo, Portugalujo k. t. p. sendas oficialajn reprezentantojn precipe oficirojn, inĝenierojn por lernadi la progresojn de l'Eŭropa industrio. Laŭ tiu ĉi vidpunkto, *Le Creusot* estas kosmopolita centro, kie oni parolas ĉiujn lingvojn. Tial oni povas esperi ke *Esperanto*, en ne malproksima tempo, estos disvastigata de la fabrikeja estraro pro ĝia certa utileco. Jam ni interparolis, unu tutan tagon de l' jaro 1905, kun juna Bulgara oficiro, kiun lia registaro sendis por observi la fabrikadon de multnombraj torpedŝipoj. Baldaŭ, la 14^{an} de Januaro 1905, okazos kun la permeso de l' kompanio, granda parolado pri la lingvo internacia en la muzikĉambro. Certe la semado esperantista produktos tie ĉi bonegajn fruktojn por nia afero.

Ankaŭ la reĝoj, la princoj, la ministroj, unuvorte la plej altrangaj personoj ĉiam vizitas la laboreman ĉefurbon, tiel kiel ili vizitas la ĉefurbon de Francujo, inter kiuj oni povas citi la « Schah » de Perusujo; la mortinta kaj neordinara ministro Ĥina, *Li Hung Tchang*; la Princo de Bulgarujo; la reĝo de Portugalujo k. t. p. *Le Creusot* ankoraŭ meritis ke la gloraj verkistoj de nia lando skribis rimarkindajn paĝojn por konigi iliajn impresojn pri tiu ĉi monda fabrikejo. El multaj ĉarmaj artikoloj, ni citos nur la priskribon de *Guy de Maupassant* kaj de *S^{ro} Hantaux*, kiujn ni utiligis por la legantaro de *Tra la Mondo*.

Hodiaŭ la scienco naskas mirindaĵojn. Hodiaŭ en nur la milito sed ankaŭ la paco postulas pli kaj pli perfektajn ilojn. Kiu deziras vidi *Progreson*, vizitos *Le Creusot*.

PRO BORD el Beaune.

(3) *Fama franca skulptisto.*

(4) *La elektra laborejo estas en champagne sur Seine.*



ĜENERALA VIDAĴO DE L'INSTITUTO.

La Belga reĝa Instituto de Woluwe-St.-Lambert por Blinduloj kaj Surdmutuloj

De LUIS CARLOS post vizito speciale farita por « TRA LA MONDO. »

Dum la ĝojtagoj, korhomoj sentas pli forte ol dum iu ajn alia momento la malfeliĉon de siaj gefratoj senigitaj, de maljusta kaj blinda sorto, de tiu aŭ alia kapablo, de tiu aŭ alia sento, kaj sekve de l' ĝuoj de la vivo.

Sajnis ĝustatempe altiri l' atenton al kategorioj inter la plej plendindaj, kaj por « Tra la Mondo » S^o Carlos Luis, tre konata pro lia agado en Belgujo, bonvolis fari vojageton el Bruselo (1) kaj viziti faman Belgan Instituton por blinduloj kaj surdmutuloj. Povu tiuj linioj altiri kelkajn donacojn al la afero tiel energie defendata kaj porbatalata de kelkaj korhomoj inter kiuj D^o Dor. kaj F^{ino} Zablon d'Her, el Liono (Lyon); S^o Th. Cart, el Parizo, k. t. p. La malfeliĉaj blinduloj havu ankaŭ siajn novjarajn donacojn.

Jam de longe mi intencis viziti la reĝan instituton, ĉar mi multe aŭdis paroli pri ĝi kaj precipe tial ke, en tiu instituto, oni instruadas Esperanton al la blinduloj kaj surdmutuloj. Ian tagon, mi sciigis pri mia venonta vizito fraton Isidoron (2), instruanton de Esperanto, kaj petis de li vizitpermeson. Post kelkaj tagoj mi ricevis afablan poŝtkarteton, invitan-tan min aliri la blindulejon kaj certigante al mi bonvenan kaj tutkoran akcepton.

Tiam mi alveturis ĝis la loĝejo de Sinjoro Vandersleyen, la afabla eks-administranto de la belga esperanta ĵurnalo: « *La Belga Sonorilo* », kaj kiu, pri tiu vizito priskribota, multe helpis al mi. Estante tremdulo, mi ne konis sufiĉe la vojon; li tre volonte kaj afablege akompanis min. Post amika trinkado kaj interparolado en lia loĝejo, ni poste piediris ĝis la instituto. Kunvojire ni, kompreneble, interparoladis esperante pri diversaj aferoj kaj la ĉefa objekto de nia interŝanĝo de pensoj estis, kompreneble, la movado esperanta ĉe la belgaj blinduloj. Ankaŭ, dum la vojirado, kun plezuro, li klarigis al mi la signifon de la ĉefaj ĉirkaŭantaj interesindaĵoj kaj vidindaĵoj: monumentoj, placoj, domoj, konstruaĵoj, arbaretoj, k. t. p. La nova brusela kvartalo, kie loĝas Sinjoro Vandersleyen, kaj aparte la Norda-

Orienta parto, estas pentrinda; ĝi faris al mi grandan impreson, ĉar ne sole tie troviĝas belaj domoj, placoj kaj lagetoj, sed ili estas tre harmonie, tre eklektike dislokitaj, kaj altiras fortege la atenton de la vizitantoj.

Tie kuŝas la « Square Ambiorix », en kies mezo staras multnombraj, belaj kaj bone pripensitaj bronzaĵaj statuoj. Pli malproksime kuŝas ankaŭ la « Square Marie-Louise » en kiu staras ŝtonegoj, krutaĵoj, sur kiuj kuŝas bela gracia konstruita svisa dometo, kaj flanke de ĝi, grandegaj akvofaloj. Sur aŭ en la tiea lageto, ĉiutage, cignoj, blekantaj anasoj kaj ruĝaj fiŝoj naĝadas. Tiuj diversaj altaĵoj kaj artefaritaj krutaj deklivoj, kovritaj per verda herbo kaj arbetoj, plibeligas la novan bruselan kvartalon.

Estis ĉirkaŭ la deka matene, kiam ni alvenis antaŭ la Blindulejon, grandega konstruaĵo, kvazaŭ preĝeja monumento kovrita per tegmentaj brikoj. Apudflanke staras du malgrandaj kvazaŭaj preĝaj turoj kun suprenstarantaj kruĉetoj.

Ni tuŝas la premilon de la sonorileto. Post momento, la pordego malfermiĝas, kaj ni enpaŝas la sojlon. Nedirebla sento de kompato ekkaptas nin kaj ekpremas nian koron; jes, unue, la nomo sola

(1) S^o Carlos Luis loĝis tiam en Bruselo. Li estas Italo.

(2) Frato Isidoro estas elektita antaŭ nelonge membro de l' honora komitato de l' Belga Ligo Esperantista.

de tiu domo, elvokas strangajn sentojn; oni sentas kvazaŭ senĉesa ombriga mallumo kaj vaga silentado ĉirkaŭvolvus ĝin; aliparte, reĝas mallaŭta mistera ĉirkaŭvaganta nokto. Estas solene kaj mallaŭte tie ĉi. Tiaj estas la sentoj, kiujn oni tuj eksentas transpaŝante la vestiblon, kaj eble la preterpasintoj mem, antaŭsentis ilin, tiujn strangajn anim-sentojn, tiel rapide ili preterpasas la blindulejon. Tial, neniu el la gelegantaro miros ĉar mi diras ke tiujn strangajn sentaĵojn ni sentis mem, kaj ankaŭ ke nia koro premiĝis pripensante pri la enloĝantoj, malgajaj knaboj, tiel kontraŭvole mizeriĝitaj de l' fatalo. Feliĉe, ĉi tiuj trovas konsolon kaj kompateman gastamon en tiu instituto.

Enirintaj, la pordisto alvokigas fraton Isidoro, kaj baldaŭ aperas el la fundo de l' koridoro, altkreska viro; antaŭ ni staras simpatia homo, kun bona kaj pensema vizaĝo. Ni, senvole, eksentas estimon pri tiu homo, kiu oferis sian vivon por helpi al proksimulo; kaj, en lia tuta eksterajo, sin montras io dolĉa, kio ĉiam karakterizas viron kutimantan zorgadi malfeliĉulojn. Li portas nigran fratan veston kaj, mezaltie, granda ŝtofa zono ĉirkaŭas lian dikan korpon.

Li alpaŝas al ni, kun vizaĝo heliĝanta; forte li premas niajn manojn kaj deziras al ni bonvenon. La interkonatiĝo tuj fariĝas kaj la interparolado fervorigas. Li ĝis tiu tempo estis neniam havinta okazon paroli esperante kun fremdaj Esperantistoj; kaj, nia interparolado, kvankam malrapida, estis tamen tre preciza; ĉar frato Isidoro, dum la parolado, ofte ne kontentiĝis uzi la unuan venantan vorton, kiu prezentiĝis al lia spirito, sed li serĉis la plej precizan esprimon; dank' al tio, nenia penso, nenia esprimo restis nekomprenita aŭ malbone komprenita de ni. En lia parolado oni sentis la veran filon de l' popolo, sindona, trankvila, senlaca laboristo, helpanta por ĉiuj mizeriĝitaj de l' sorto. Maloftaj estas tiaj homoj!

Gvidataj de nia afabla kondukanto, ni tuj vizitas la studĉambrojn. Trapasinte la vestiblon, ni eniras koridoron, kun muroj ornamitaj: unuflanke, per la reĝaj bustoj; aliflanke, pendas diversaj honoraj akiritaj ĉe la multnombraj ekspozicioj, precipe en Bruseŭo, Antverpeno, Londono, Parizo, k. t. p. Nia kondukanto nin enkondukas en la direktoran saloon, kie la direktoro nin salutas afable kaj petas nian kondukantan amikon, vizitigi al ni la interesindaĵojn de la blindulejo. Post kelkaj minutoj de interparolo ni eliras el la salono.

La surdmutuloj.

Estis la horo de la ludtempo kaj festtago. Gajega bruado alvenas al ni. Ni eniras en vastegan korton,

difinitan por la blindaj malgranduloj kaj surdmutaknaboj; tie, ili ludas inter si, je ĉiuspecaj ludoj. Nekredeble kaj mirinde! Tiuj infanoj moviĝadas kaj ludadas, ili tute ne ŝajnas malgajaj kiel oni estus pensinta kaj supozinta. Frato Isidoro farinte specialan signon per la fingroj, kelkaj el la surdaj ludantoj alvenas al li, alkondukantaj aliajn blindajn kunludantojn. Dume, multaj knaboj rondiras kaj ĉirkaŭas nin. Frato Isidoro alparolas ilin esperante Ĉi tiuj, aldirektinte la okulojn ĉielen, nin gracie salutas kaj deziras al ni, tiel ĉarme kiel bone: « Bonan tagon, sinjoroj. »

Denove, frato Isidoro demandas kelkajn el ili.

— Arturo, kion vi faras?

— Mi ludas, kara frato.

— Kian ludon?

— Mi ludas je ĉevaloj, kara frato.

— Bone, ĉu vi estas kontenta pri via sorto, mia Arturo?

— Jes kara frato, mi neniel deziras alian. Ni ĉiuj vin ametas, kaj tio sufiĉas al ni.

— Reiru, Arturo, kun viaj kunludantoj.

— Kaj vi, Ernesto, kion vi trinkas, kiam vi soifas?

— Mi trinkas akvon, kara frato.

— Ĉu vi trinkas ĉiam akvon?

— Ne, kara frato, dum la festtagoj, mi trinkas vinon kaj manĝas bongustajn kukojn.

— Kaj vi, Aŭgusto, ĉu vi scias kalkuli?

Aŭgusto staris kun la rigardo direktita supren kaj liaj manoj iomete tremetis.

— Ne timu, mia Aŭgusto; respondu malrapide kaj sentime.

Kaj la knabo kalkulis ĝis ĉento, esperante.

— Kian aĝon vi havas, Aŭgusto?

— Mi estas sepjara, kara frato.

— Bone, tre bone, rekomencu viajn ludojn, miaj karaj infanoj, — aldiris la frato.

Post tiu infana interparolado, mi kaj sinjoro Vandersleyen, kun mirigitaj mienoj kaj larĝe malfermitaj buŝoj, ne povis kredi tion, kion ni estis vidintaj kaj aŭdintaj. Tiel aŭdinte, tiel bone, tiel perfekte paroli esperante de tiuj knaboj, oni povus kredi, ke ĝi estas ilia gepatra lingvo. Tion, ili ŝuldas al frato Isidoro, kiu tiel sin donis por la divastiĝo de Esperanto inter Blinduloj. La ludoj momente ĉesigitaj pro scivolo, ree komencis kun vigleco kaj gajeco. Vidinte kurantajn la knabojn senhalte kaj senĉese, oni preskaŭ dubus, ĉu ili estas vere blindaj, precipe la malgranduloj, ludantaj kun la surdvidantoj; la pliaĝaj lernantoj promenadas grupe; aliaj enpensigadas aŭ faras pli seriozajn paroladojn. La plenkreskuloj ludas aparte pli seriozajn ludojn.

Ni trapaŝas la 16 studĉambrojn; unue, tiujn de la surdmutuloj, poste, tiujn de la blinduloj. Ne volante plue tedi al la gelegantaro, mi resumas tie ĉi miajn



SERCIO DE L' SURDMUTULOJ: LA PILKLUDO.

ĉefajn impresojn,

La knabo surda, enirante la instituton, unua-vide kaj ĝenerale, havas inteligentan mienon, sed, tre ofte, li posedas neniajn konojn, kaj bedaŭrinde, tiu inteligenta ŝajna eksterajo aliĝas. Neniel li povas klarigi al si, la plej malgrandan nombron el la objektoj ĉiutage starigitaj kaj antaŭmetitaj antaŭ liajn okulojn; kaj rilate al ili, nur tio kio estas al li sentebla per liaj organsentoj li antaŭsentas; alie, ĉio fariĝas por li nekomprenebla.

Koncerne lian instruadon, ĝi devas esti antaŭsentema; kiam ia knabo lernis kelkajn sufiĉajn literojn, kombinantan sonon, tiam oni diras al li vorton klarigontan objekton difinitan per tiu vorto; poste, li skribas tiun vorton; kaj tiel la tri figuraĵoj: vorto skribita, natura objekto aŭ desegnaĵo, vorto elparolita enpenetras en lian inteligenton kun iliaj reciprokaj rilatoj.

Komence, la tasko de la instruanto estas multa, ordigante kaj taŭgaranĝante, laŭ sama maniero, la laboron antaŭdifiritan; por ĉia objekto, necese, la nombro de la jam lernitaj vortoj dum la daŭro de l' jaro, faciligas la laboron. Sed, profite, la lernantoj posedas bonege tion, kion ili estas lernintaj kaj ilia ortografo estas bonege neriproĉinda. Mi rimarkis la belecon de la skribo kaj la purecan staton de la libroj kaj kajeroj. La komenco de la juna surdmutulo pri la elparolado de la literoj, vortoj, kaj legado de la libroj necesigas grandan dolĉecon kaj atendemon, kiujn ĉiuj instruantoj, por siaj instruatoj, ne ofte posedas! Kompreneble, ĉia litero havas sian propran kaj apartan metodon! Jen la knabo ekzamenas kaj observas atentege la buŝon de la majstro, jen, per liplegado, li atentigas je la



SEKCIO DE L' SURDMUTULOJ: LA GIMNASTIKO.

aŭ viditan. Sed, kredeble, tio ne fariĝas per unu sola tago, tio postulas multajn penadojn, sindonon kaj zorgadon de la parto de la instruanto. La legado per la lipoj (liplegado) estas la kapableco kiun bezonas la surdmutuloj por ekscii tuj la eldiradon de la kunestantaj personoj. Tiu kapableco mirigis trege nin, tiom pli ke ni sentis nin nekapablaj pri ĝi. Tio fariĝas ĉe la surdmutuloj per konstanta uzo, kaj, tuj post la naskiĝo, per la ĝusteco de la ekrigardo kaj senĉesa observado. Ĉe kelkaj el ili, ĝi atingas grandan perfektigon tre remarkindan.

Pli antaŭenirante la studĉambrojn, ni rimarkas la progreson de la instruado. La objektoj jam konitaj pli kaj pli grandigas kaj plimultiĝas, tiel same la skribarto, la facileco de elparolado kaj liplegado. La kalkulado, unue, kaj ekskluzive antaŭsentema, enkondukas, ne senteble kaj laŭmezure, la junan surdmutulon en la plej alte abstraktan mondĉon: la unuagrada instruado. La unuagrada instruado estas ja, por li, plena je malhelpaĵoj, kaj kontraŭaĵoj, precipe por knaboj aŭdintaj neniam ion diri kaj ne havontaj nenian konon, pri tio, kio estas al ili ne sentebla aŭ videbla.

Pri la profesia instruado.

Nur la plenkreskuloj ĉeestas la lernejojn pri desegno; antaŭe, ili trapasis tra la superaj ceteraj lernejoj kaj studĉambroj. La muroj de tiuj studĉambroj estas kovritaj per ĉefverkoj profesiaj, pro kiuj la lernejo povas fieriĝi kaj ĵaluziĝas la plej bonajn komunumajn profesiajn lernejojn el la lando. Tie, la desegnarto ricevas sian plenan aliformigon profesian: desegnaĵoj por lignaĵistoj kaj pri la ligna industrio, k. t. p.; sinsekve oni envenas la malsamajn laborejojn de la lignaĵistoj, tajloroj, ŝuistoj kaj aliaj. En ĉiu el tiuj laborejoj kaj pro la tro granda nombro da lernlaboristoj, la religia instruanto estas helpata de du ĉeflaboristoj de la urbo. La metia kaj profesia instruado ne limiĝas je tiuj de la tajloroj, ŝuistoj, lignaĵistoj; sed, laŭ la akirebleco kaj natura inklino de la lernantoj, aŭ la prefero, kiujn ili atestas por tiu aŭ alia, oni al ili aljuĝas la metion aŭ profesion pliamatan kaj pli akireblan. Kelkaj elektas alian profesion; multaj el ili



SEKCIO DE L' SURDMUTULOJ: LA LIGNAĴISTOJ.

sekvis kursojn je ĝardenkulturo, terkulturo, kaj ricevis kun grandegaj gratuloj, la unuajn premiojn kaj profesiajn diplomojn en la diversaj okazintaj konkursoj. Pro la peto de kelkaj gepatroj, 2 surdmutuloj lernis la panfaradon, 3 la korbplektadon, 1 la pentrarton, kaj 2 fotografarton kaj skribmaŝinon.

Trairintaj la dormejojn, lavejojn, banejojn, manĝejojn, ludĉambrojn kaj elektrejon, ni eniras korton. Grandega miro atendas nin. Sesdeko da blanke kaj flanele vestitaj surdaj gimnastikanoj atendas nian alvenon, kaj antaŭ niaj okuloj komencas serion el ĉiuspecaj gimnastikaj ekzercoj sub la direktado de surdlernanto anstataŭanta la forestantan profesoron de gimnastiko. Neforgesinda spektaklo. Post gratuloj de ni donitaj, ni aliras la blindulejon.

La blinduloj.

Tie ĉi, kompreneble, staras demando. Efektive, oni demandas sin, pro kiaj kaŭzoj, la surdaj kaj blindaj lernantoj ne kunestas en la sama instituto. Nenia ordo pedagogia postulis tiun kunestadon, diris al ni, la direktoro. Sed, komence, pro mastrumado kaj administracia ŝparemo, tio fariĝis necese. Tamen, tiu kunestado estas pli ŝajna ol reala. Ekzistas ne du apudestantaj sekcioj, sed, sub ĝenerala direktado, staras du apartaj institutoj. La organizado kaj irado pri tiuj ĉi lastaj, ĉiel kaj reciproke, ne ĝenas unu la alian, kaj ne kontraŭstaras iel. Ĉie la surdmutuloj estas apartigitaj de la blinduloj, en lernejoj, manĝejoj, dormejoj, kursoj, ludkorto, preĝejo kaj laborejoj. Iliaj ludoj kaj la eksterordinaraj, apartaj kontentigoj nepersonaj, kiujn oni ĉiam al ili egalmezure havigas, unuj de l' aliaj diferencas. Ili kunestadas dum specialaj kunvenoj, festoj, datrevenoj, kie la blinduloj kaj surdmutuloj helpas al si



MAŜINSKRIBADO. — PENTRADO. — FOTOGARFO.

SEKCIO DE L' SURDMUTULOJ: LA ŜUISTOJ.




reciproke; dum la datreveno de la landfesttago kaj instituta festo, kiu okazas en la dekunua de Julio, la blinduloj kunhelpas al la ekzercoj de la surdmutuloj.

Unuavide, la juna blindulo ne vidigas, kiel la surdmutulo, mienon inteligentan, vekigintan. Oni eraristion kredante; kontraŭe, li estas tre gajema kaj inteligenta; li tute ŝajnas ne suspekti pri sia malfeliĉo. Rilate al la surdmutuloj li havas korpan malsuperecon, sed posedas treege spritan superregecon; la nevidebla mondo de la pensoj plilarĝigas sian horizonton, kaj la percepton de multnombraj konajoj ne videblaj por li, la lernado ĝin havigos. Kelkaj opinias ke la surdmutulo diferencas kaj eĉ superas la blindulon; koncerne la fiziologian rilaton, eble, sed kun justeco, oni povas diri, ne kontraŭdireble, ĉiam blindulo superas surdmutulon.

Por ekinstrui la blindulon pri la legado kaj skribado, ambaŭ kune estantaj la esenca fundamento de ĉiu serioza instruado, la vido anstataŭiĝas per la palpado. Por tio ĉi ekzistas specialaj reliefaj literoj el speciala alfabeto nomita: Alfabeto Brailles'a. La reliefaj literoj konsistas el 64 punktoj; ĉiu litero formiĝas el 1 ĝis 6 punktoj, dislokita laŭ la litero skribota. Per tiu sistemo oni skribas ankaŭ muzikon.

La legado de la blinduloj estas tiel rapida kiel tiu de la vidantoj. Ili skribado ne atingas la rapidecon de la plej lertaj vidskribantoj. Tamen, ĝi egalvaloras tiun de la plej ordinara skribantoj. Por la korespondado kun la vidantoj, la blinduloj uzas specialan sistemon elpensitan de instituta profesoro: la belga punkto. Por la vidantoj, ne sole ĝi estas videbla skribo, sed ankaŭ tre legebla figuraĵo. Tiuj figuraĵoj similas niajn presejajn ĉefliterojn.

La studoj pri religio, historio, geografio, kalkulado, estas instruataj, tute same kiel en la ceteraj komunumaj landaj lernejoj, escepte por la studado kaj uzado de la geografiaj kartoj. La instruado de la geografiaj kartoj postulas specialan atenton. Oni vere miras vidante tiujn infanojn, senigitajn je l' vido, ne flankigante, palpe promenantajn rapide la manojn sur la geografiaj kartoj aŭ sur terglobo, kaj klarigante laŭte al la ĉeestantoj la ĉefajn urbojn, riverojn, lagojn, marojn, la vojiradon per la kiel eble plej mallonga vojo, kaj neniam ŝanceliĝantaj pri la klarigoj kaj demandoj petitaj. Mi aldiras, ke ĉi tiuj geografiaj kartoj estas absolute mutaj; nenia



SEKCIO DE L' BLINDULOJ : LA KORBPLEKTISTOJ.

nomo, nenia litero. La muraj kartoj estas aranĝitaj per lignaĵoj, metalfadenoj. Mi klarigu: la riveroj, montoj, fervojoj, kurbigoj, estas figuritaj per metalfadenoj kaj punktigitaj linioj; urboj, vilaĝoj, per najloj kun diversaj kapoj kaj dikecoj, k. t. p.

Ĉiuj lernantoj lernas la du naciajn lingvojn, francan kaj flandran; plie, multaj el ili, ĉirkaŭ 75 (la blindulejo enhavas 250 lernantojn), lernas nian karan Esperanton, kaj jam de longe korespondadas per ĝi kun Ameriko, Ĉilujo, Anglujo, Francujo, Svedujo, k. t. p., pri la movado esperantista ĉe la blindularo.

Pri la profesia instruado.

La celo de la muzika instruado alprenita en la instituto, estas elformi orgenistojn, profesorojn por la edukejoj, same kiel por burĝaj infanoj. La blinduloj montras emon al tiu arto, en kiu enkoncentriĝas por ili la dissemnitaj belajoj en la malsamaj artoj neakireblaj; tial la plimulto el ili sukcese partoprenas ĉiutage en la ĉiutagaj kursoj, cetere tre bone aranĝitaj.

La malplej emaj al la muzikarto, lernas metion. Granda nombro da blinduloj, precipe la muzikemaj lernas agordadon de la fortepianoj; pri ĝi ili estas multe pli lertaj ol la vidantoj kaj ilin superas. Aliaj okupas sin pri korbplektado kaj seĝplektado, kaj farado de



SEKCIO DE L' BLINDULOJ : LA HARMONIO.

ĉiuspecaj metalfadenoj kaj feraj uzajoj.

Kiel ni jam diris, tiel vidinte labori tiujn infanojn, ĉu oni devos laŭdi la profesorojn instruantajn, aŭ la lertecon de l' laboristoj senigitaj de la vido, al kiuj la palpado kun aŭdado, preskaŭ redonis la videblecon perditan.

Ĝeneralajoj.

La instituto ne sole sin okupas pri la instruado kaj edukado de la lernanto, sed por linkutimigi al ŝparemo kaj antaŭzorgemo, ĝi donas al ĉiu infano, post lia eniro en blindulejon, kasan ŝparlibreton. En ĝi oni alkalkulas la sumetojn donacitajn de la vizitintaj gepatroj kaj tiujn gajnitajn per la laboro. Alian parton el lia taglaboro oni alkalkulas en lian helpan pensian libreton. Je lia eliro el la instituto, tiu ĉi tiom kiom eble, helpas al li, kaj penadas havigi al li laboron.

Post la longedaŭra vizito de la diferencaj studĉambroj kaj apartaĵoj, antaŭ ol foriri, frato Isidoro petis de dekjara blinda knabo, ke li kantu ion esperante. La knabo tuj rapidis, kaj kun la helpo de alia



SEKCIO DE L' BLINDULOJ : LA SEĜPAJLUMANTOJ.

blinda kunlernanto, akompananta lin per fortepiano, kantis belan esperantan himnon tradukitan el la angla lingvo de frato Isidoro. Tio estis kortuŝanta kaj preskaŭ igis nin ploreti.

Post finiĝo de l' kanto ni gratulis kaj dankis la belan bukharan knabon, kiu fariĝis feliĉa montri sian scion.

Jam estis malfrue, kiam ni forlasis la blindulejon, post grandaj gratuloj kaj dankoj al la tiel sindona kaj afabla frato Isidoro, kiu tiel permesis al ni pasigi kelkajn belajn horojn, kies memoron ni neniam forgesos.

Originale verkita de
LUIS CARLOS (Italujo.)

Niajn plej bonajn dezirojn al niaj legantoj, por la nova jaro.

« TRA LA MONDO ».



JUDITH

DE FRAŬLINO OXFENFORD EL BRIGHTON

La aŭtorino opiniis preferinde konservi la anglajn nomojn, ĉar la jena rakonteto intencas montri la pensojn kaj sentojn de anglaj vilaĝanoj dum la epoko kiam oni kredis je la sorĉistinoj (Witches).

Ŝi estis nomata « La Sorĉistino ».

Kompreneble oni devas esti tia, kia oni estas nomata, alie kial la nomo? Estas angla proverbo kiu diras: « Donu al hundo malbonan nomon — kaj — pendigu ĝin. »

Koincidoj aldonitaj al la superstiĉo kaj la nescio, donis al ŝi la diritan nomon dum ŝia juneco; kaj kiam, antaŭ multe da jaroj, ŝi estis perŝita de la viro kiun ŝi amis, kaj kiam la afero estis sciita de la vilaĝanoj, la timo kaj malamo, kiuj de longe estis bruletantaj kontraŭ ŝi, ekflamegiĝis; kaj ŝi estis forpelata el la vilaĝo al la arbaro. Ĉu ŝi vivos — aŭ mortos? Kiu zorgos pri ŝi? Ŝi estas sorĉistino!

Sed ŝi vivis malgraŭ la malvarmo, malsato, kaj senĉesa persekutado. Dek longajn, lacigajn jarojn ŝi loĝis en tiu arbaro; ŝia hejmo estas loko duone kaverno, duone dometo, kiu estis la rifuĝejo de arbohakisto, kaj en kiun ŝi venis tiam, kiam ŝi estis forpelita el la vilaĝo.

Hodiaŭ vespere, ŝi sidas apud la fajro, pensante pri la historio de sia vivado.

Vidiĝe, ŝi estas altkreska, gracia virino, ĉirkaŭ tridekjara; ŝia vizaĝo estas ankoraŭ bela, malgraŭ la sulkoj desegnitaj sur ĝin de ŝiaj suferoj, kaj de

ŝia malsata, sovaĝa vivado. Estas facile kompreni, kial ŝi estas samtempe malamegata kaj timata: kiam ŝi vin rigardas, estas kvazaŭ vere via animo estus nudigata; kaj la malbonaj pensoj aŭ agoj, kiujn vi faris, ŝajne sin levas kontraŭ vin, por konfuzegi kaj hontigi vin. Estas malmultaj personoj, kiuj havas tiun ĉi povon, sed se iam oni renkontas unu el ili, oni neniam forgesas tiun okazon. Ho, senutilaj estos la vortoj tiam, kiam ni estos alvokitaj antaŭ la Juĝistan Moŝton, se, eĉ senvorte, la homa okulo povas nin hontigi. Kaj ankoraŭ ŝiaj okuloj estas nur tiuj de virino, kies propra animo estas pura, honesta kaj nobla; sed, preskaŭ antaŭ ol ŝi povas memori, ŝi estis nekomprenata kaj suferigata de tiuj, kiuj tute ne povis kompreni la bonecon, je kiu ili mem estis nekapablaj; kaj nune, dum ŝi sidas antaŭ la fajro, estas kruela lumo en ŝiaj okuloj, la lumo de la flamo, kiu brulas interne, jam de tiel multaj jaroj, kaj ŝi amas ekforkuregi kaj venĝi ŝin al iu ajn, kiun ŝi renkontus.

La nokto estas simpatia al ŝi. Estas ventego: la arboj ĝemas kaj plendas, kvazaŭ ili demandus, kial la Spirito de la Ventoj koleras kontraŭ ili; kial ĝi tiel kruele ilin tordas kaj fleksas. Iamomente estas

kvietegeco ; kaj subite brilegas helega fulmo anoncanta laŭtegan tondron post kiu la arboj kaj ventoj, kiuj rilate ŝajnis ĉesi siajn bruojn, denove ĝemegas kaj krias, siblas kaj blekegas pli laŭte ol antaŭe. La tuta naturo freneziga kaj furioziga, kaj tiam la virino ankaŭ estas freneza, pro doloro de korpo kaj spirito.

Hodiaŭ, dum ŝi estis ĉe la vilaĝo, infano falis apude ; instinkte ŝi kliniĝis por ĝin helpi, sed ĝi ekkriegis pro teruro de la « Sorĉistino » ; oni forpelis ŝin el la loko, kaj ŝia kapo ankoraŭ sangadas pro vundoj ricevitaj de la ŝtonoj, kiujn oni ĵetis sur ŝin. Bone ŝi scias tion, kio okazos, se la infano malsaniĝos.

Dum ŝi sidas kaj rigardadas la fajron, antaŭscenoj de ŝia vivo revivas antaŭ la spiritokuloj, kaj image ŝi pli uniĝas :

Ŝi estis sola, malgaja, ne zorgita knabino ; kaj dum ŝi pensas, ŝi resentas tiel akre kiel iam la doloron kaj koleron kaŭzitan de la malamo kaj suspekto laŭ kiuj ĉiam ŝi estis konsiderata. Kial ? Simple ĉar — ho ve ! — ŝi estis altkreska, nigrhara, kaj gracia ; kaj ŝiaj gefratoj estis malgrandaj blondharaj, kaj malgraciaj ; sed ĉefe oni ŝin malamegis ĉar ŝi superis la malsagajn, vulgarajn malpurspiritajn hipokritulojn ĉirkaŭantajn ; kaj tion ili sentis.

« De kie ŝi akiris sian fieran mienon kaj altegajn ideojn ?

« Kial ŝi estas nigrhara, nigrokula, kvankam ŝiaj gepatroj, eĉ geavoj estis ĉiuj blondaj ? »

« Kial ŝi estas nomita Judith'o, kvankam, de antaŭmemortempo la plej maljunaj knabinoj de la familio estis nomataj Suzan'o ?

Ciujn tiujn ĉi demandojn oni faris multfoje en la vilaĝo, kun seriozaj, dubaj rigardoj kaj kapskuetoj. Estis malpermesite al la aliaj geknaboj aŭ paroli aŭ ludi kun ŝi, kaj tiel ŝi vivadis sola kaj malestimata. Ŝi estis tro fiera por plendi, kaj altigis la kapon kiam pasis la aroj el geknaboj, kiuj feliĉe kune ludis, kvankam ŝia koro suferis, kaj alvokis al malmulte da simpatio kaj amo. Ha nu ! Nur estis la efektiviĝo de la maljusta leĝo kiu punas la infanojn pro la pekoj de la gepatroj. Tiel ĉiam estis, tiel ĉiam estos, ĝis la finiĝo de la tempoj. Sed maldolĉe ŝi pensas kiel multe ŝi suferis pro la peko de sia patrino.

Sed, ian tagon, kiam ŝi estis ĉirkaŭ naŭjara, okazis ŝanĝo por ŝi. Dum ŝi, sola, travagis tra la arbaro, ŝi renkontis du ĝeinfanojn ; la unuan, dekjaran knabon ; la alian, lian fratinton, sesjaran knabinton. Ili estis la infanoj de arbohakisto, vidvo, kiu loĝis en la arbaro. Ili tuj amikegiĝis, kaj de tiu tempo ŝi iris tage ĉe ilin, kaj restadis de la mateno ĝis la vespero kun ili. Ŝi amegis ilin per la tuta forto de pasia naturo ; pli ĉar ili estas la du solaj homestajoj por ŝi amindaj, ol ĉar ili estas aparte simpatiaj.

Nun la okuloj de la virino apud la fajro moliĝas. Ŝi memoriĝas kiel ŝi zorgis pri la malgranda Mary'o, kaj serĉis por ŝi la plej belajn kaj la plej maturajn sovaĝajn fragojn.

Sed Harry, la frato, estis ŝia karulo. Kun li ŝi vagis en la plej densa parto de la arbaro ; ambaŭ, ili konkuris suprenrampi la arbojn ; ambaŭ, ili faris novajn vojetojn tra la intermiksitaj subkreskaĵoj, kaj poste ili estis devigitaj meti ŝtonojn kaj aranĝi branĉojn diversmaniere por ke ili mem povu trovi

la enirojn, tiel lerte ili kaŝis la novvojetojn de aliaj okuloj.

Kaj same li amis ŝin. Multfoje li batalis por ŝi, kiam li aŭdis iun paroli malestimeme pri ŝi. Kiam ŝi estis kun li, ĉiam ŝi estis protektata je la ŝtonoj kaj mokadoj de l' aliaj infanoj. La plenkreskuloj diris « Si ensorĉis la knabon » ; la malgranduloj aŭdis kaj rediris ĝin, kaj kriis je ŝi « Ci estas sorĉistino », kaj pretekstis timi ŝian « malbonan okulon ». Tiel, oni konis ĝin kiel « La Sorĉistino ».

Ŝi iris al la lernejo, sed tie, pli ol iam, ŝi estis turmentata, ĉar ĉiam ŝi lernis pli rapide ol la aliaj, kaj tio estis por ili nur alia pruvo pri ŝia malbona deveno. Kiam ŝi trovis, ke ŝi povas legi kaj skribi korekte la lecionojn donitajn al ŝi, ŝi diris al la lernestro ke ŝi ne plus venos en la lernejon. Kaj ŝi ne plu vojis ! Ŝia patro batis ŝin per bastono ; ŝia patrino donis al ŝi nur panon kaj akvon ; la pastro publike mallaŭdis ŝin, sed estis senutile. Al sia patro, ŝi diris « Vi ne havas la rajton por bati min, vi ne estas mia patro ; ĉiuj tion diras. ». Ĉe tiuj vortoj, lia vizaĝo mallumiĝis pro pasio, sed la mano, kiu tenis la bastonon, tremis kaj fine ĝin forĵetis. Al sia patrino, ŝi diris : « Forsendu min de tie ĉi, vi malamegas min, neniam mi revenos ». Sed kompreneble tio kaŭzus pluajn babilaĵojn ; do ili permesis ŝin vagi kien ajn ŝi volus sed nur dum la tago : « Kiam ŝi revenus, vespere, se estus ia ajn manĝrestaĵo, ŝi havus ĝin ; se ne..... ŝi devus seniĝi. »

En tiu tempo ŝi renkontis siajn ĝeamikojn. Kiam ŝi estis ĉirkaŭ dekkvarjara, Manĝo mortis. Malfeliĉa Judith ! Harry tiam laboris ĉe najbara vilaĝo, tial ŝi sola estis kun sia ĉagrenego. Estis vintro, malvarma, malseka vintro ; ĉar ŝi ne povis forestadi tiel longe de sia hejmo ; ŝi sidadis en angulo de la ĉambro, sencece rigardanta malplenspacon, sinperdanta en sia doloro. Eĉ ŝiaj gefratoj respektis ŝian malfeliĉecon, kaj malplie ŝin mokis aŭ incitis. Ŝia patrino parolis preskaŭ dolĉe al ŝi. Unufoje en ilia vivo, ŝiaj gepatroj komprenis ke, apud ili, estas io kion ili ne komprenas, kaj kion ili sentas esti super ili. Ili sin demandis : « Kio do estus okazinta, se estus Harry kiu mortis ? »

La tempo pasis. La vilaĝanoj ekscias ke ŝi kreskas bela, kaj ŝia « malbona okulo » iĝas pli potenca ! Ŝi trovis perditan infanon kaj alportis ĝin al ĝia patrino, sed ĉar la infano mortis de malvarmumo, oni diris ke ŝi estis ĝin malbeninta. Se ĉevalo aŭ bovino mortis, ŝi estis la kaŭzo ; ŝi alrigardis ĝin !


La viroj allogiĝis kaj enamigiĝis je ŝia malluma beleco, kaj malgraŭ ŝia mieno fiera al ili, amindumis ŝin. Tial la junulinoj jaluziĝis, kaj konsekvence ŝin malamegis kun pli mortiga malameco, farante al ŝi pli da malutileco per siaj mallaŭtaj paroletoj kaj supozajoj ol la tuta sincera malamo de la maljunuloj aŭ la timo de la infanoj. Sed ankoraŭ neniam iu povis pruvi, ke ŝi estas farinta ion esence malbonan, kaj malgraŭ la superstiĉo, malsciado kaj malamego, oni havis sufiĉe da bonsenco por vidi ke kontraŭ ŝi estas nur ĉirkonstanca evidenteco. Oni estis devigata konfesi ke aliaj infanoj malvarmumis, kaj aliaj ĉevaloj kaj bovinoj mortis dum ŝi estis malproksime ; kaj pri la malsaĝeco de la viroj — nu ! Viroj estas malsaĝuloj kaj neniu povis nei, ke ŝi estas belega.

Daŭranta.

*Origine verkita kaj ilustrita de C. W. OXENFORD.
(Anglujo.)*

MIKSAĴOJ.

Por la propagando.



Kie estas la ĝardenisto?

PROBLEMO 31^a (DE CH. BRUNET).

Mi estas tre strangega besto ĉar mi havas kapon de kato kaj voston de liono, koron de hundo en ventro de soriko. Kiu mi estas?

PROBLEMO 32^a (DE J. FLOURENS).

Mi lumigas; returnite mi estas nenio.

PROBLEMO 33^a (DE LA SAMA).

Samaj piedoj kun du diferencaj kapoj estas du malamikoj.

PROBLEMO 34^a (DE NAZUMULO).

Mia unua parto antaŭ aŭ post mia dua, ĉiam mi estas koloro!

REGULARO DE NIAJ KONKURSOJ.

1^o Ĉiuj amuzaĵoj, problemoj proponataj kaj solvoj devas esti sendataj al Sinjoro Ch. Brunet, 59, cours Victor Hugo, Bordeaux, kiu prenis sur sin la redaktadon de la paĝo « Miksaĵoj ».

2^o Krom esceptoj speciale dirotaj, la solvoj devos esti sendataj al S^{ro} Brunet antaŭ la dato montrita post la problemoj; kaj ne 15 tagoj post ricevo de la Revuo.

Ĉiuj legantoj povos sendi solvojn ĉar la templimo estos sufiĉe daŭra.

3^o Divenintoj estos ordigataj, kvaronare, laŭ la nombroj de ĝustaj solvoj senditaj de ĉiu, kaj premioj estos donacataj al la plej sagacaj.

4^o Por iaj konkursoj, aparte gravaj, oni aljuĝos specialajn premiojn.

Ĉi apud'e ni vid'as mal'jun'ul'in'et'o'n kies vizaĝ'o kaj man'o'j simil'as tiu'j'n de nigr'ul'in'o. Sur la figur'o est'as ankaŭ vid'abl'a'j dom'o'j kun pint'a'j tegment'o'j, fenestr'o'j, kamen'tub'o; mur'o kun afiŝ'o'j, lign'a bar'il'o, arb'o'j, kresk'aĵ'o'j elir'ant'a'j el ter'o kaj kresk'aĵ'o'j en pot'o'j; kelk'a'j el tiu'j pot'o'j est'as met'it'a'j en grand'a'n korb'o'n, proviz'it'an per rimen'o'j por facil'e ĝi'n port'i sur la dors'o.

La sinjor'in'o marŝ'as sur ŝton'plat'o'j form'ant'a'j trotuar'o'n; la mez'o de l' strat'o est'as pavum'it'a per rond'a'j ŝton'o'j.

Sed est'as iu ne tuj vid'abl'a sur la figur'o; est'as tiu, kiu zorg'as la kresk'aĵ'o'j'n kaj kiu port'os ĉe la sinjor'in'o'n la flor'o'j'n, kiu'j'n ŝi ŝajn'as admir'i. Serĉ'u li'n, amik'o'j leg'ant'o'j.

« TRA LA MONDO ».

PROBLEMO 35^a (DE X...).

El sekvantaj literoj eltrovi kion sekvas.

a
d d g
g i i i o
o o r
r

muzika noto
konduki sin loko lokon
termometra divido
naskito
gramatika finiĝo.

Ĉiun vorton oni legas horizontale kaj vertikale.

La solvoj estos akceptataj ĝis la 30^a de Marto 1906^a.

Rim. Oni adresu la solvojn NUR POŝTKARTE al Sinjoro Brunet Ch. 59, Cours Victor Hugo, Bordeaux.

ATENTU!

Por la unua kvaronjara klasigo, jen estas la premioj:

- 1^a Dek frankojn mone.
- 2^a Jarabono por la unua jaro de « Tra la Mondo ».
- 3^a Albumo por fotografaĵoj.
- 4^a Botelo de « Mieline Gelson ».
- 5^a Duonjara abono por la unua jaro.
- 6^a 24 Belegaj ilustritaj alĝeriaj poŝtkartoj.

En la proksima numero, nomaro de la divenintoj de la du unuaj problemoj.

Fianĉo, baldaŭ edziĝonta diris en la hejmo de sia fianĉino: — Morgaŭ matene ni edziĝos, ni maturanĝos en hotelo, vespere ni forveturos Italujon...

La estonta bopatrino: — Tre malbona!

La fianĉino: — Patrino! lasu lin paroli, la malfeliĉulo ordonas sian lastan volon.

10072.

Inter amikinoj:

Ludovikino. — Morgaŭ vespere, mi iros balon. Kiu scias ĉu mi tie konatiĝos kun l'ama junulo...

Margarito (al si mem) — Ĉiam malsprita! Ŝi revas pri lamulo!

(Laŭte, interrompante ŝin) Ho! Kiom mi aprobas vian deziron: kutime, lamuloj estas tre inteligentaj viroj.

Ludovikino. — ?!?

J. FLOURENS.

Mi havas kataron (dika malvarmumo), kiu multe ĝenas min. — Ho! Plej plezure, mi prenos kelkajn de vi: mi amegas tiujn ĉi bestetojn.

J. FLOURENS.

Malgranda korespondado kaj Anoncoj.

La kvaronjaraj abonintoj kiuj deziras daŭrigi sian abonon estas petataj TUI sendi la abonpagon por la estontaj numeroj.

Al esperantaj revuoj. — Kelke da niaj kunfratoj, kvankam ricevantaj regule nian revuon, ne sendas la sian; ni estos devigataj ĉesi nian sendon se ili ne ĉesigas tiun situacion.

Al niaj kunlaborantoj. — Oni bonvolu tre legeble skribi kaj nur sur unu flanko de l' paperfolioj, lasante marginon por la eblaj korektaĵoj.

Fino **Cederblad** (Svedujo), **S^o Frantisek Svačina** (Bohemujo), **S^o Gambier** (Francujo). — Dankon pro viaj interesaj kristnaskaj skriboj, aŭvenintaj malfeliĉe tro malfrue. Ili utilos la venontan jaron.

Fino **Odile Prudent** (Francujo). — Sama rimarko pri via ĉarma rakonteto. Jes sendu desegnaĵojn.

S^o P. H. (Svedujo). — Ĉu via peto pri subskribo rilatas ĉiujn artikolojn aŭ nur eĥojn?

S^o Carpenté (Francujo). — Koran dankon pro viaj sciigoj pri kursoj kaj librovendistoj.

S^o Fr. Schuck (Germanujo). — Ni povas akcepti vian proponon se vi liveras tipografajn kliŝaĵojn pretajn por la presoj. Bonvolu tuj skribi pri tio.

S^o Seynaeve (Belgiujo). — Ne, mi ne ricevis la rondirantan ĵurnalistan gazeton proponitan de S^o F.

S^o Chaussegros (Francujo). — S^o Capé nin petas vin sciigi ke li ne ricevis la nomaron anoncitan en via cirkulero de l' 20^a de Oktobro.

S^o Maréchal (Anglujo). — Volonte ni raportos pri via libro sed, kompreneble, ni bezonas koni ĝin.

S^o Berthelot (Francujo). — Kiel vi povis vidi, ni devenis vian deziron. Niaflanke ni atendas ĉiam respondon al nia peto.

S^o Slater (Anglujo). — Dankojn pro viaj interesaj sciigoj pri la glava dancado kaj afabla promeso por aliaj.

S^o H. J. Lindstedt (Svedujo). — Viaj desegnaĵoj estas tute interesaj. Sed, aliafoje bonvultu plume desegni, ĉar kopio estas pli facila.

S^o Roussot (Francujo). — S^o Montrosier tute ne povas, pro laborego, respondi vian demandaron. Gaoljano, mamuto, signifas, france, gaoljan mamouth.

S^o Federico Villaréal (Peruo). — Mi esperas ke vi nun ricevas regule la revuon. Bonvultu min sciigi pri tio.

Ni dezirus koni adreson de Inĝeniero Kazi Ĝirej kaj de S^o H. de Ladevèze.

S^o E. L. Robinson (U. S. A.). — Via plano estas bonega; cetere vi trovos precize en tiu numero demandaron rilatantan la temon pri kiu ni interkribis.

Abato Peltier (Francujo). — Dankon pro la portreto kaj viaj afablaj klopodoj.

Fino **Oxenford** (Anglujo). — Mi ricevis vian beletan desegnaĵon; koregan dankon.

S^o Romano Ayra (Hispanujo). — Mi penados enpresi vian verkon.

ANONCETOJ!

Privatoj 0 fr. 15 ĉu porle por abonintoj kaj 0 fr. 30 por neabonintoj.

S^o Steenbuch, Sumoto, Awaji (Japanujo) interŝanĝas poŝtmarkojn kaj ilustritajn poŝtkarton.

Fino **Ancelin**, Bde Vauban, Cambrai, (Francujo) deziras interŝanĝi kudramason kontraŭ iu ajn objekto (krom libroj). Oni faru proponojn.

S^o Campar (Germanujo), deziras trovi oficon de vartistino en Francujo (Oni bonvolu skribi al la administracio de *Tra la Mondo*).

S^o Bord, Beaune, Côte d'or (Francujo), resendos ilustritan poŝtkarton klarigantan la regulon de la participoj al kiu sendos poŝtkarton.

L'ESPÉRANTISTE.

France kaj esperante. Multaj sciigoj pri la grupoj kaj ĉiuspecaj esperantistaj verkoj. **ABONO:** En Francujo: 3 fr.; ekster Francujo: 3,50 fr. Administranto, Louviers, (Eure).

THE BRITISH ESPERANTIST.

Angla kaj esperanta lingvoj. Jarabono, 1 sh. 6 d. (2 fr.), 13, Arundelstreet, Strand, Londono (England).

LA BELGA SONORILLO.

Propaganda revuo: france, flandre, kaj esperante. 4 fr. ĉiujare — Unu n^o 0,40. Sin turni al S^o J. COOX, Duffel (Belgiujo).

GERMANA ESPERANTISTO.

Organo de diversaj germanaj grupoj esperantistaj (ĉiunonate). Redaktata germane kaj esperante. **Jara bono:** 3 f. 75 Administracio kaj Redakcio: Esperanto Verlag, Möller & Borel, Berlin, S., 95, Prinzenstrasse.

ESPERANTO.


France kaj esperante. Unu numero 10 cent., 24 n^oj sinsekvaj 3 fr. Ĉe S^o Paul Berthelot, Céret, P. O., France. Tre rekomendinda al franclingvaj samideanoj.

Sendu mendojn kaj anoncojn kun poŝtaj mandatoj al « Administranto de *Tra la Mondo* », 15 Boulevard des 2 Gares, Meudon (S. et O.), France, antaŭ la 10^a de ĉiu monato, por la venonta numero.

ĈIAM TRE LEGBLE SKRIBU.

LA MIÉLINE GELSON MIRINDA RIMEDO KONTRAŬ La Falo de l' Haroj

Ĉe ĉiuj bonaj kombistoj kaj ĉe
FERRÉ, BLOTTIÈRE et Cie
102, rue de Richelieu, Paris.



ĴUS APERINTA!

FRANÇOIS GÖPPEL

Unua Ĉapitro

de miaj memorskriboj

ESPERANTIGITA DE
AUGUSTE MONTROSIER



PREZO: 75 CENTIMOJ

PARIS
ALPHONSE LEMERRE, ELDONISTO
21-23, PASSAGE CHOISEUL, 21-23
M. DECELY

Ĉarma verketo de l' fama franca akademiano, kun antaŭparolo tute aproba por Esperanto.

Ĉe « Tra la Mondo ».

Belegaj propagandaj poŝtkartoj kun vidaĵoj de Algerio;
fr., afrankite, ĉiu dekduo.

Propagandaj poŝtkartoj de « Tra la Mondo », **fr. 1,50** ĉiu cento.

ĈE « TRA LA MONDO ».

GÉRANT: EUGÈNE CAPÉ.

A. J. WITTERYCK, Presisto, Bruĝo.